

# EL POPOLA ĈINIO

9
1973






La akvokonservejo Hianghongdian en la supra baseno de Pihe-rivero

# Elektraj Lampoj en Tajhang-montaro

Mont-vilaĝo ekhavas elektrajn lampojn.



En la altaj montoj de Lingĉuan-gubernio sin trovas malgranda hidroelektra stacio Ŝilihe.


La nomita gubernio estas sur la plej alta parto de Tajhang-montaro. Por konstrui la elektran stacion la popolanoj de Lingĉuan-gubernio penlaboris tri jarojn de 1968 ĝis 1971 kaj batalis per ŝtalaj stangoj kaj marteloj sur ĉirkaŭ cent danĝeraj montoj. Ili konstruis akvokondukan kanalon kiu trapasas pli ol 80 montvalojn kaj ses tunelojn. Por tiu konstruo oni plenigis 48 profundajn lagetojn kaj movis pli ol 400,000 kubmetrojn da teraĵo kaj ŝtonoj per 66,000 labortagoj. Fine konstruiĝis la hidroelektrejo, kiu nun bone servas al lumigado kaj funkciigo de maŝinoj de pli ol 100 produktaj brigadoj de ses komunumoj.

La sidejo de la elektrejo estis dezerta loko. Oni ofte devis labori sur nuboskrapantaj krutaĵoj sub kiuj estas profundaj abismoj. Vizaĝe al tiuj malfacilaĵoj kompartiano Ma Tianlu, la ĉefa direktanta kadro de la konstruejo, ĉiam manĝis, loĝis kaj laboris kune kun la konstruantoj tiel ke lia bona ekzemplo stimulis ilin penlabori kun la revolucia spirito de sinapogo sur siaj propraj fortoj kaj luktado en malfaciloj. Ili tranoktis surmonte, laboris en aero pendante sur ŝnuro kaj vekte alportis grandan kvanton da sablo de la loko malproksima je kvin kilometroj, kiom oni povis transporti nur per 4,000 aŭtoj. La konstruantoj faris vinĉon el malnova materialo, per kiu ili sukcesigis transportadon de ŝtalaj tuboj kun pezo po unu tuno sur la krutan montodeklivon je 237 metroj altan. Per tio ili ŝparis ĉirkaŭ dekmil juanojn.

Dum la malvarmaj tagoj por konstrui la hidroelektrejon, kompartiano Ĝaŭ Kifeng la unua saltis en la ĝisoste malvarman Vudi-lagon kun profunda kaj torenta akvo por konstrui ponton super la lago. Spite al vivdanĝero konstruanto Ĝang Honghaj sturmis al la loko kun flugantaj ŝtonpecoj kaj elsavis la vunditan kolegon falintan de rokmuro.

Simile al brila perlo la nova elektrostacio prilumigas tiun regionon kaj senĉese kreis feliĉon por la montanoj. Kaj la feliĉoĝuantoj neniam forgesos la heroajn konstruantojn!


Komunumanoj, kadroj kaj teknikistoj faras mezuradon ĉe la fontejo de Ŝilihe-rivero.




Akvokonservejo por la elektrostacio



La akvokonduka kanalo sin direktas al la elektra stacio.









Sur la konstruejo de la akvokonduka kanalo

Elektroveldisto







Junaj konstruantoj de la elektra stacio





Muntado de akvokonduka tub-linio sur la kruta rokmuro



Panoramo de la elektra stacio

GIANHUA:


# La Irigaciaj kaj Drenaj Sistemoj de Nia Lando


POST la Liberiĝo, laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ Zedong "**Akvoutiligo estas aorto de agrikulturo**", la ĉina popolo, kun plena memfido venki la naturon kaj turni plagan akvon en utilan akvon, disvolvis grandskalan amasan movadon de konstruado de irigaciaj kaj drenaj sistemoj. Post penado de pli ol 20 jaroj oni gajnis rimarkindajn sukcesojn. Centmiloj da grandaj kaj malgrandaj konstruaĵoj nun servas al la industrio, agrikulturo kaj popola vivo.

### MALNOVA ĈINIO OFTE ATAKATA DE INUNDO KAJ SEKEGECO

En la malnova Ĉinio senĉese okazis katastrofoj de inundoj kaj sekegeco. Sub la regado de la feŭdaj dinastioj kaj la reakcia registaro de Ĉiang Kajŝek, longe oni ne dragis la riverojn, kaj la digoj estis ofte breĉitaj. Erozio kaj alkaliĝo de grundo estis seriozaj.

*La ĉefa konstruaĵo de Ŝenvo-akvorezervejo de Liaŭning-provinco*





*Hidroelektra stacio Gulandi de Kinghaj-provinco*

Antaŭ la Liberiĝo inundo kaj sekegeco ofte okazis en la basenoj de la Flava Rivero, Hajhe-rivero, Huajhe-rivero kaj de la meza kaj malsupra partoj de Jangzi-rivero. La serioza sekegeco de la jaro 1928 plagis 13 provincojn de la norda, sudokcidenta kaj nordokcidenta partoj de la lando. Vasta tero dezertiĝis kaj ĉie vidiĝis kadavroj de malsatmortintoj. La katastrofo plagis pli ol 120,000,000 homojn. En 1931, inundakvo kovris Gianghanebenejon kaj la basenon de Huajhe-rivero. 8,000,000 hektaroj da kampoj de la provincoj Hunan, Hubej, Henan, Anhuj kaj Giangsu estis inunditaj. Milionoj kaj milionoj da plagitaj kamparanoj perdis sian hejmon kaj migris ĉien.

Antaŭ la Liberiĝo, dum sia regado de pli ol 20 jaroj, profitante la postulon de la popolo pri reordigo de la riveroj la reakcia registaro de Ĉiang Kajŝek trompis la popolon, senbride prirabis la popolon per emisio de ŝtataj obligacioj por riverreordigo, sed ĝi faris nenian gravan konstruaĵon. Male, por sia propra intereso, Ĉiang Kajŝek detruis iafoje popolan kontraŭinundan konstruaĵon. En 1938, dum la Kontraŭjapana Rezistmilito, Ĉiang Kajŝek ne rezistis al la japanaj agresantoj, sed retiriĝis. Por ŝirmi sian reakcian armeon en forkuro, li ordonis dinamiti la digon de la Flava Rivero ĉe Huajuankoŭ proksime de la urbo Ĝengĝoŭ. La akvo inundis 54,000 kvadratajn kilometrojn de 3 provincoj, 12,500,000 homoj estis damaĝitaj de la katastrofo, kaj 890,000 homoj dronis.

## LA NOVA ĈINIO AKCENTAS KONSTRUADON DE IRIGACIAJ KAJ DRENAJ SISTEMOJ

Post la Liberiĝo, la Komunista Partio de Ĉinio kaj la popola registaro tre akcentas la konstruadon de irigaciaj kaj drenaj sistemoj. La granda gvidanto de nia popolo Prezidanto Maŭ Zedong multfoje inspektis la Flavan Riveron, Jangzi-riveron kaj aliajn ĉefajn riverojn kaj elmetis taskojn pri riverordigo. En la dua jaro post la fondiĝo de la nova Ĉinio, Prezidanto Maŭ Zedong jam faris la instrukcion "**nepre jungu Huajhe-riveron**", poste, faris unu post alia la gravajn instrukciojn "**klopodu por sukcese kompletigi la inundakvodividajn konstruaĵojn de Gingiang-rivero por la bono de la vasta popolo**", "**bone aranĝu al la Flava Rivero**", "**nepre jungu radikale Hajhe-riveron**" k.s. Tio estas granda kuraĝigo por la ĉina popolo.

Depost la Liberiĝo, nia popola registaro laŭplane aranĝis konstruadon de irigaciaj kaj drenaj sistemoj. En la restariga periodo de la nacia ekonomio antaŭ 1952, la ŝtato prenis la batalon kontraŭ inundo kiel ĉefan punkton. En la malpli ol du jaroj oni mobilizis 4,690,000 popolanojn kaj 320,000 soldatojn de la Ĉina Popola Liberiga Armeo al riparo kaj plifirmigo de digoj. Samtempe, oni ekfaris enketon pri la ĉefaj riveroj de nia lando kaj iuj grandaj konstruaĵoj estis komencitaj unu post alia. En la periodo de la Unua Kvinjara Plano komencita de 1953, la ŝtato ellaboris projekton pri jungo de Hajhe-rivero kaj plifirmigo de la digoj de Jangzi-rivero, faris sintezan planon pri jungo kaj utiligo de la Flava Rivero kaj komencis studi pri reordigo de la Hajhe-rivera sistemo. Dum la periodoj de la dua, tria kaj la nuna kvinjaraj planoj, nia lando prenis la mezajn kaj malgrandajn konstruojn kiel ĉefajn kaj atentis ankaŭ necesajn grandajn konstruojn en akvoutiliga konstruado.

Tiel ke estis disvolvitaj la aktiveco de la centro kaj la lokoj, la aktiveco de la urboj kaj kamparo, la aktiveco de la laboristoj, kamparanoj kaj teknikistoj kaj rapidiĝis la konstruado por akvoutiligo.

Ĉiujare la ŝtato investas certan sumon da mono por la akvoutiliga konstruado. La industrioj ĉiujare laŭplane liveras por konstruado de irigaciaj kaj drenaj sistemoj nombron da ŝtalo, cemento, elektraj motoroj, elektrotransmisiaj ekipaĵoj kaj diversaj maŝinoj. Gvidantaj kadroj de la diversaj niveloj ofte iris al konstruejoj por fari direktadon kaj partopreni en laboro, dank' al kio rapide progresis la konstruadoj.

## GRANDA ŜANĜIĜO DE LA RIVEROJ

Konstruado de irigaciaj kaj drenaj sistemoj en la pasintaj pli ol 20 jaroj tute novigis la fizionomion de la riveroj de nia lando.


En la pasinteco, ĉe la meza parto de Jangzi-rivero la riverakvo ofte superbordiĝis kaj kaŭzadis inundegojn. Post la Liberiĝo, inspirate de la instrukcioj de Prezidanto Maŭ, la popolo de ambaŭ bordoj venke finis la konstruadon por divido de inundakvo de Gingiang-rivero en malpli ol 3 monatoj, per kio fundamente solviĝis la problemo de inundo-prevento sur Gianghan-ebenejo. Poste, la popolo ĝenerale firmigis la ĉefajn kaj branĉajn digojn de Jangzi-rivero, reordigis multe da riveroj kaj lagoj, dragis navigliniojn, konstruis pli ol 500 grandajn kaj mezgrandajn akvorezervejojn kaj dekmilojn da malgrandaj akvoutiligaj konstruaĵoj* en la baseno. La areo de irigaciataj kampoj en la meza kaj malsupra baseno de Jangzi-rivero multiĝis de 4,000,000 hektaroj antaŭ la Liberiĝo ĝis la nunaj 10,000,000. La produktokvanto de greno kaj kotono senĉese grandiĝas.

Post la Liberiĝo, la popolo de la baseno de Huajhe-rivero komencis reordigi Huajhe-riveron longe plagintan. En la pli ol 20 jaroj, oni konstruis 30 grandajn akvorezervejojn kaj pli ol 2,000 mezgrandajn kaj malgrandajn en montregionoj, fosis novajn riverojn Hinji, Hinŝu kaj la Subej-an Ĝeneralan Irigacian Kanalon kaj aliajn 10 grandajn riverojn fluantajn en maron aŭ Jangzi-riveron. Oni transformis lagojn kaj marĉejojn en tenejojn de inundakvo, konstruis grandajn irigaciajn sistemojn de la riveroj Pihe, Ŝihe kaj Hangbu, finis la konstruadon de Giangdu-a Elektra Drena kaj Irigacia Stacio kun flukvanto de 200 kubmetroj po sekundo. Nun la drena povo de la baseno de Huajhe-rivero 206-obliĝis kaj la irigaciata areo kvinobliĝis kompare kun tiu de 1949. Antaŭ la Liberiĝo en tiu baseno "inundo okazis je pluvego, inundeto je pluveto kaj sekegeco je senpluveco", sed nun ĝi jam fariĝis grava produktejo de greno kaj kotono de nia lando.

Post la Liberiĝo, ankaŭ la popolo de la baseno de Hajhe-rivero, kiu multe suferis de inundo, sekegeco kaj salalkaleco de grundo, aktive faris konstruadon de irigaciaj kaj drenaj sistemoj. Ĝi konstruis akvorezervejojn Guanting, Mijun k.a. kiuj ludas certan rolon kontraŭ inundo. En 1963, la popolo de la baseno de Hajhe-rivero venkis eksterordinaran diluvon kaj komencis konstruadon por radikale reordigi Hajhe-riveron. La popolo penlaboris 9 vintro-printempojn, fosis kaj dragis Hjuanhuj, Hejlonggang, Nov-zija k.a. sume 31 ĉefajn riverojn, ordigis pli ol 200 branĉajn riverojn, konstruis 20 kontraŭinundajn digojn, tiel ke 5.4-oble altiĝis la drenpovo de inundakvo kaj 7.8-

*Loĝantoj de la norda bordo de la Flava Rivero de Ŝandong-provinco laboras sur la konstruejo por ordigi la riveron.*





*Panoramo de Dugiang-jan*

oble tiu de stagna akvo. Krome oni konstruis en la supra baseno de Hajhe-rivero 85 akvorezervejojn grandajn kaj mezgrandajn kaj pli ol 1,500 malgrandajn, kiuj fundamente forigis la minacon de sekegeco kaj inundo. En Hebej-provinco, kiu plej multe suferis de katastrofo en la historio, la nuna irigaciata areo trioble pli grandiĝis kompare kun tiu antaŭ la Liberiĝo. En 1972, Hebej-provinco venkis eksterordinaran sekegecon neokazintan en la lastaj 50 jaroj kaj gajnis la trian abundan rikolton en la historio.

En la malnova Ĉinio, la Flava Rivero ofte breĉis la digojn. Post la Liberiĝo, sub la unueca planado de la ŝtato la popolo de la tuta baseno akorde kunlaboris kaj faris kompletan sintezan reordigon al la Flava Rivero. Ĉe la malsupra parto oni dikigis kaj altigis digojn kun totala longeco de 1,800 kilometroj, tiel ke en somero kaj aŭtuno ili ne breĉiĝas pro ŝveliĝo de la fluo; ĉe la meza kaj supra basenoj de la rivero oni forstumis kaj faris akvokonservajn konstruojn por mildigi erozion. Nun la trunka fluo de la Flava Rivero estas reordigita per grandaj pivotaj konstruaĵoj por akvorezervo, irigacio kaj elektroprodukto kaj sur la branĉaj riveroj oni konstruis ĉ.mil hidroelektrejojn kaj akvorezervejojn grandajn, mezgrandajn kaj malgrandajn, kiuj ne nur liveras elektron al urboj kaj vilaĝoj, sed ankaŭ senĉese grandigis la irigaciatan areon de la baseno de la Flava Rivero. Nun ŝanĝiĝas la baseno de la Flava Rivero kiu multe suferis de katastrofoj kaj malmulte produktis en la pasinteco.

## LA DISVOLVIĜANTAJ IRIGACIAJ KAJ DRENAJ KONSTRUADOJ

Samtempe kun la laŭplana reordigo al grandaj riveroj fare de la ŝtato, la popolanoj de niaj diversaj lokoj ankaŭ konstruis centmilojn da mezgandaj kaj malgrandaj irigaciaj-drenaj konstruaĵoj, kiuj multe progresigis la industrion kaj agrikulturon de la kamparo.

La gubernio Linhian oriente de Tajhang-montaro antaŭe estis montregiono kun ege malmulta akvo. Post la Liberiĝo, la popolo de la gubernio decidis tute ŝanĝi ĝian fizionomion per la revolucia spirito "reformi Ĉinion kun la Malsaĝa Avo montotranslokiga kiel ekzemplo". Sub la gvido de la Partio kaj registaro, per siaj propraj fortoj, post klopodo de pli ol dek jaroj, la popolo de la gubernio trahakis Tajhang-montaron kaj alkondukis la akvon en Ĝanghe-rivero. Ili konstruis 172-kilometran trunkan kanalon, 300 malgrandajn akvorezervejojn, 20 malgrandajn hidroelektrajn staciojn kaj branĉajn kanalojn kun longeco de 1,300 km. Tiel ili kompletigis la konstruaĵojn de la irigacia sistemo de la kanalo "Ruĝa Flago", kiu nun irigacias 40,000 hektarojn da kampoj de la gubernio. De tiam la malriĉa montregiono, kie akvo estis pli kara ol oleo, fariĝis bela montregiono kun klaraj fluoj, kiu ĉiujare akiras abundan rikolton.

En la movado de lernado de Daĝaj en agrikulturo, la popolo de Hiangtan-regiono de Hunan-provinco konstruis irigacian sistemon de


Ŝaŭŝan. La konstruado de la pivotaj konstruaĵoj de la sistemo estis komencita en julio de 1965 kaj finiĝis post 10 monatoj. Poste, stimulate de la Granda Proletara Kultura Revolucio la konstruado de la sistemo iris pli rapide. Oni konstruis kaj funkciigis la finitajn partojn samtempe. Kaj la kanala sistemo estis pliapaŝe kompletigita. Nun la akvo de Lianhe-rivero irigacias 53,300 hektarojn da kampoj de kelkaj gubernioj kaj urboj ĉirkaŭ Ŝaŭŝan kaj liveriĝas al iuj minejoj, fabrikoj kaj urboj. La irigaciaj konstruaĵoj akcelis la agrikulturon, kaj la hektara produktokvanto de greno de la irigaciata regiono atingis 7,125 kg.

En iuj nordaj regionoj de nia lando kie mankis akvofonto kaj ofte estis minacata de sekegeco, la komunumanoj disvolvis ardan putofosan movadon sur la bazo de agrikultura kolektivigo kaj akiris rimarkindajn sukcesojn. Nun en la 9 nordaj provincoj kaj 3 aŭtonomaj regionoj kaj 2 municipoj inkluzive de Ŝandong, Ŝanhi, Hebej kaj Henan, pli ol miliono da maŝinputoj ludas grandan rolon en irigaciado.

Nun, samtempe kun la movado de lernado de Daĝaj en agrikulturo, la irigaciaj kaj drenaj konstruaĵoj en la tuta lando ludas aktivan rolon en gajno de pli abundaj rikoltoj.


---

* *En Ĉinio akvorezervejoj kun kapacito de 100,000,000 aŭ pli multaj kubmetroj estas klasifikitaj kiel grandaj; tiuj kun kapacito de 10,000,000 ĝis 99,999,999 kubmetroj estas mezgrandaj kaj tiuj kun kapacito de malpli ol 10,000,000 kubmetroj estas malgrandaj.*



*Ĉimagang-akvedukto de Hubej-provinco*

*Giangdu-pumpstacio de Giangsu-provinco*





# Vizito al la Irigacia Regiono de PŜH

EN la tempo de somera rikoltado, ni vizitis la Irigacian Regionon de PŜH en Anhuj-provinco. Ni pririgardis akvorezervejojn, hidro-elektrejojn, veturis en nove konstruitaj kanaloj kaj vizitis nombron da popolaj komunumoj. Ni vidis, ke la irigacia sistemo ludas ĉiam pli grandan rolon en disvolvo de agrikulturo, surakva transportado, elektroprodukto kaj kulturado de akvaj produktaĵoj.

## GRANDIOZA IRIGACIA SISTEMO

La Irigacia Sistemo de PŜH estas unu el la grandaj akvoutiligaj konstruoj de nia lando. Ĝi ricevis tiun nomon pro tio, ke en tiu regiono sin trovas la naturaj riveroj Pihe, Ŝihe kaj Hangbu. Pihe-rivero kaj Ŝihe-rivero estas branĉoj de Huajhe-rivero kaj Hangbu-rivero estas tiu de Jangzi-rivero. La ordigado de la antaŭaj du riveroj estas parto de la plano por radikala jungado de Huajhe-rivero. La Irigacia Sistemo de PŜH ampleksas vastan areon de 12,600 kvadrataj kilometroj. Oni planas irigacii 10,960,000 muojn da kampoj, el kiuj 8,000,000 muoj estas irigaciataj. Tiu irigacia sistemo havas 13 ĉefajn kaj trunkajn kanalojn kun larĝeco de 30 ĝis 60 metroj. Reto de irigaciaj kanaloj en tiu regiono kondukas akvon en vastajn montregionojn kaj dank' al tio aperis ŝtuparkampoj kaj fruktoĝardenoj. Tiu irigacia sistemo inkluzivas milojn da kompletigitaj konstruaĵoj kiaj akveduktoj, tuneloj, reguligaj kluzoj kaj ŝoseaj pontoj.

La respondeca kamarado, kiu akompanis nin dum la vizitado, diris al ni, ke tiu regiono estis fame konata pro katastrofoj antaŭ la Liberiĝo. Ĉar la pluvokvanto en la supraj basenoj de la tri riveroj estas granda kaj koncentra. Ĉiufoje kiam pluvegis, aperis montotorentego kaj la bordoj estis inunditaj kaj samtempe la ŝveliĝo de Pihe kaj Ŝihe estigis grandan minacon al Huajhe-rivero. En la montregionoj de iliaj mezaj kaj malsupraj basenoj la pluvokvanto estas malmulta. Oni ne povis utiligi la akvon de la tri riveroj por irigacio ankaŭ pro tio, ke la riverlitoj estis 10-20 metrojn sub la nivelo de la kampoj, tial ofte okazis sekegeco. Katastrofoj de inundo kaj sekegeco devigis multajn popolanojn forfuĝi de sia hejmloko.

En la tria jaro post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, Prezidanto Maŭ Zedong elmetis la instrukcion "**nepre jungu Huajhe-riveron**". Kvankam tiam nia lando ankoraŭ estis en la periodo de restarigo de la nacia ekonomio kaj havis multajn malfacilojn en diversaj aferoj, tamen la ŝtato donis grandan sumon da mono kaj grandan kvanton da ŝtalaĵoj kaj cemento kaj mobilizis popolamasojn ordigi Huajhe-riveron kaj liberigi tiun regionon de minaco de inundo. Pli poste, la ŝtato konstruis 5 grandajn akvorezervejojn ĉe Foziling, Mejŝan k. a. lokoj kaj 4 hidroelektrejojn, dank' al kio la minaco de inundo de la riveroj Pihe, Ŝihe kaj Hangbu estis fundamente eliminita kaj ankaŭ Huajhe-rivero fariĝis ne tiel danĝera.


Tamen la vasta areo de montregiono ankoraŭ estis minacata de sekegeco. En 1958, sub forta subteno de la Partio kaj la ŝtato, la gvidanta instanco de Liu-an-subprovinco ellaboris planon pri konstruado de la Irigacia Sistemo de PŜH kaj komencis la konstruadon kun la popolanoj de la okcidenta kaj meza partoj de Anhuj. Ili fosis ĉefajn kaj trunkajn kanalojn por konduki riverakvon sur montojn kaj formi tri memflue irigaciatajn

areojn de Pihe, Ŝihe kaj Hangbu, interligi ilin por reguligi la fluvolumenojn, plivastigi la irigaciatan areon kaj liberigi la montregionojn de minaco de sekegeco.


## KONDUKI AKVON TRA MONTOJ

Ĝuste kiel la gvidanto de la irigacia regiono diris, estas ne facile plenumi la konstruadon de tiel granda irigacia sistemo. Dum la vizitado ni vidis, ke tie estas multaj altaj montoj kaj profundaj ravinoj, la terformo estas tre komplika kaj diversaj estas la geologiaj strukturoj. Iuj irigaciaj kanaloj devas transpasi ravinojn, aliaj devas traflui montkreston, tial oni devis trahaki multajn montojn, plenigi multajn valojn kaj starigi komplikajn konstruaĵojn. Inĝeniero partopreninta en la konstruado diris al ni, ke la unua malfacilo renkontita de ili estis malsufiĉeco de teknikistoj kaj projekta materialo. Relative longan tempon oni bezonus sole por la termezurado, se nur la inĝenieroj kaj teknikistoj de la konstrua komandejo farus tiun laboron. Sed ili mobilizis popolamasojn laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, kolektis nombron da komunumanoj kaj kulturis 1,500 teknikistojn. La nove elbakitaj teknikaj laborantoj, kiuj bone konas la terformon kaj akvosistemon de la loko, faris termezuradon pri la konstruotaj kanaloj kune kun la profesiaj teknikistoj kaj liveris multajn projektajn materialojn. Dank' al tiu aranĝo oni plenumis la termezuran taskon nur per 4 monatoj.

Dum nia vizitado, ni aŭdis multajn rakontojn pri la konstruado de la irigacia sistemo. Unu el ili estas la rakonto pri la batalo de la konstruantoj de Longhekoŭ-akvorezervejo kontraŭ inundakvo. En printempo de 1959, kiam streĉege iris konstruado, pluvis foje kaj refoje kaj minacis inundo pli frue ol kutime. La akvonivelo de la akvorezervejo kreskadis senĉese. La ĉefbaraĵo altis 49 metrojn, sed laŭ meteoantaŭdiro la akvonivelo leviĝos ĝis la alteco de 55 metroj post 7 tagoj pro pluvego. Nur per altigo de la baraĵo antaŭ plia ŝveliĝo de Hangbu-rivero, oni povos sekurigi la vilaĝojn kaj kampojn en la malsupra baseno kun longeco de pli ol cent lioj (1 lio = 0.5 kilometroj). La konstruantoj ĵuris, ke ili altigos la baraĵon je 1 futo, se la akvonivelo leviĝos je 1 colo. Ili luktadis kontraŭ la torentego sub la gvido de la Komandejo de la Irigacia Sistemo de PŜH. La ŝtonhakistoj masonis protektan deklivon starante en akvo, la komunu-



*Elektra Ŝiptransportilo de la Granda Kluzo de Fejŝuj-rivero portas ŝipon trans digon.*



*Kamparanaj kaj profesiaj teknikistoj kune faras mezuradon pri la konstruota kanalo.*

manoj senĉese portadis teron kaj traktoroj streĉe laboris por premkompaktigi la baraĵon. Dank' al ilia penlaborado en tagoj kaj noktoj, la inundakvo estis barata kaj la konstrua laboro estis garantiata en glata irado.

Ni rigardis ankaŭ la gigantan akvedukton de Gianggjunŝan super Fengle-rivero kun alteco de 27 metroj kaj longeco de 894 metroj. Ĉiu el ĝiaj spanoj larĝas 52.5 metrojn. Sur tiu akvedukto konstruita en la Granda Proleta Kultura Revolucio povas navigi 20-tonela boato kaj la akvo kondukata de ĝi povas irigacii 400,000 muojn da kampoj. La respondeca kamarado nin akompananta diris al ni, ke en la kultura revolucio la popolo en la irigacia regiono pliapaŝe disvolvis la avantaĝojn de la popola komunumo, racie uzis la homfortojn kaj materialojn, ĉiujare konstruis novajn irigaciajn kanalbranĉojn kaj nombregon da akcesoraj konstruaĵoj kaj samtempe sub helpo de la ŝtato starigis nombron da spinaj konstruaĵoj, tiel ke la irigaciata areo kreskis de 3,460,000 muoj en 1965 ĝis la nunaj 8,000,000 muoj.


## KANTO DE FELIĈO

Ni veturis en vaporŝipo PŜH N-ro 1 laŭ la Ĉefa Kanalo de Pihe-rivero serpentumanta sur montoj. Ambaŭborde bone kreskis grenplantoj kaj vicoj post vicoj da fruktarboj. Oni sciigis al ni, ke la plejparto de la irigaciataj kampoj en la regiono povas esti irigaciataj memflue kaj granda kvanto da homfortoj de la popolaj komunumoj estas ŝparitaj. Ni vidis, ke miloj kaj miloj da muoj da kampoj antaŭe minacataj de sekegeco fariĝis rizkampoj, kaj multaj dezertaj montetoj kaj plaĝoj fariĝis fekundaj kampoj aŭ fruktoĝardenoj. Depost la ekfunkcio de la Irigacia Sistemo de PŜH, senĉese kreskis la produktokvanto de greno en la irigacia regiono. Laŭ statistiko, la 7 gubernioj de Liu-an-subprovinco pliproduktis ĉ. 600,000 tunojn da greno en la lastaj tri jaroj kaj ĉiujare vendis al la ŝtato ĉ. 400,000 tunojn da superbezona greno. Ankaŭ la produktokvanto de ekonomiaj plantoj kiaj oledonaj plantoj kaj kotono, kreskis tre multe. Dum nia vizito ni pririgardis

Ĉanggang-brigadon, kiu ofte suferis sekegecon en la pasinto, sed nun la plejparto de ĝiaj kampoj estas memflue irigaciataj kaj la pomua produktokvanto de greno atingis 570 kilogramojn.

La popolo en la irigacia regiono de PŜH ankaŭ konstruis grandan nombron da malgrandaj hidroelektrejoj utiligante niveldiferencon de akvorezervejoj kaj irigaciaj kanaloj, kaj tio kreis kondiĉon por disvolvi la lokajn industriojn kaj agrikulturan mekanikigon. Nun plejparto de la komunumoj kaj brigadoj jam havas siajn malgrandajn fabrikojn por ripari agrikulturajn maŝinojn kaj prilabori agrikulturajn flankoproduktaĵojn. Post solvo de la problemoj de elektro kaj akvo, nombro da ŝtataj fabrikoj fondiĝis unu post alia. Ni prenu la urbon Liu-an kiel ekzemplon. Antaŭ la Liberiĝo troviĝis en ĝi nur nombro da metiejoj. Post la liberiĝo industrio disvolviĝis en ĝi paŝon post paŝo. Post la finkonstruo de la Irigacia Sistemo de PŜH, ĝia industrio progresis impete kaj nun jam havas pli ol 40 fabrikojn de elektromaŝinoj, kemia sterko, kemiaĵoj, medikamentoj, papero, ŝpinado kaj teksado, aŭtopartoj, ŝtalo kaj fero, lagroj, manĝaĵoj kaj konstruaj materialoj.

La konstruita Irigacia Sistemo de PŜH malfermis novajn navigajn liniojn kaj en la ĉefaj irigaciaj kanaloj povas veturi motoraj boatoj de 300 toneloj. La totala longeco de la navigaj linioj inkluzivitaj de la ŝtata plano estas pli ol 1,100 kilometroj, t.e. 350 pocentoj de tiu antaŭ la Liberiĝo. Per tiuj



*Muĉang-elektrejo de la ĉefa kanalo de Pihe-rivero*

navigaj linioj, komercaj entreprenoj povas transporti agrikulturajn maŝinojn, kemian sterkon, insekticidojn kaj aliajn ĉiutage bezonatajn industriaĵojn al la montregionoj kaj la riĉaj lokaj produktaĵoj povas esti ĝustatempe transportataj al diversaj partoj de la patrolando. La Irigacia Sistemo de PŜH alportas nun feliĉon kaj prosperon al la popolo en tiu regiono.

*Intensa fiŝkaptado en Anfeng-lago*



# LA HODIAŬA KJUJU

*La Flava Rivero torentas al la oriento,*
*Kiu al ni portas feliĉon kaj for la ĉagrenon.*
*Nun Kjuju-vilaĝo ŝanĝiĝis jam ĝis fundamento,*
*Kaj riĉajn rikoltojn donadas ĉiuj entreprenoj.*

Dum la lastaj dudek jaroj, Kjuju-brigado, persistante en akvoutiliga konstruado, ŝanĝis sian fizionomion de malriĉeco kaj postiĝinteco kaj prosperigis la tutan montvilaĝon.

## KONSERVADO DE AKVO KAJ GRUNDO


Kjuju-brigado situas en la nordokcidenta parto de Ŝanhi-provinco. Okcidente de ĝi fluas la Flava Rivero kaj staras kalva montaro. Ĝiaj 19,000 muoj (15 muoj = 1 hektaro) da tero dise lokiĝas sur montetoj kaj en valoj. En la pasinteco tiu loko suferis de tiel serioza perdo de akvo kaj grundo, ke de ĉiu kvadrata kilometro da ĝia tero 130 tunoj da koto kaj sablo estis forportitaj de akvo ĉiujare en la Flavan Riveron. La meznombra pomua produktokvanto de greno estis nur 25-30 kilogramoj. La tieaj loĝantoj vivis mizere generacion post generacio.

En la jaro 1955, la loko trafis seriozan trosekecon. La amasoj sub la gvido de la partia filio de Kjuju-vilaĝo konstruis kelkajn malgrandajn akvoutiligajn konstruaĵojn por rezisti kontraŭ la naturaj katastrofoj, sed tio ankoraŭ ne povis radikale elimini la minacon de sekegeco kaj inundo. Ĝuste en tiu jaro, Prezidanto Maŭ faris al la gubernioj Janggaŭ kaj Liŝi de Ŝanhi-provinco instrukcion **"estas necese atenti pri la konservado de akvo kaj grundo"**, kiu montris la direkton por la konstruado en montregiono kaj multe kuraĝigis la Kjuju-anojn. Tiam ankaŭ la esplora taĉmento pri konservado de akvo kaj grundo por la meza kaj malsupra baseno de la Flava Rivero venis tien, por helpi ilin prilabori la planon pri transformo de montoj kaj riveroj. Multaj estis la malfaciloj je la komenco. Iuj kadroj ne konvinkiĝis, ke ili mem povos tion fari per siaj fortoj, kaj krome du kulakoj de la vilaĝo instigis iujn vilaĝanojn forlasi agrikulturadon por komercado. Vizaĝe al tiu stato, la partia filio



*Vang Hajjuan laboras kune kun komunumanoj.*

*Abunda rikolto de greno*



organizis kaj mobilizis la amasojn por malkaŝi la intrigon de la klasaj malamikoj kaj lerni ripetade la instrukcion de Prezidanto Maŭ por starigi al ili fidon pri venko super la naturo. Post diskutado, ili decidis unue transformi la valon Taŭnigoŭ.

La valo pli ol unu kilometron longa kuŝas tuj apud iu sablomonteto. Je venta tago, sablo estis blovita al ĝiaj apudaj agroj; dum pluvego, granda kvanto da koto kaj sablo estis portita en la Flavan Riveron. Vintre de tiu jaro, la amasoj sub la gvido de la tiama estro de la kooperativo Vang Hajjuan komencis reformi tiun valon. Sabla vento blovis tiel furioze ke ili ne povis malfermi siajn okulojn kaj de ili fositaj kavoj por planti arbojn estis tuj duone plenigitaj de sablo. Sed ili venkis la malfacilon. Post penado en vintro kaj printempo, ili konstruis vicon super vico ŝtuparkampojn en la valo, starigis unu post alia grandajn digojn kun arboj sur ilia supro kaj kampoj ĉe ilia piedo. Someron de la sekvinta jaro pluvegis. En aliaj valoj torentis superakvo, dum Taŭnigoŭ konservis plejparton de sia tero. Tio ĝojigis la komunumanojn. Eĉ la dubintoj diris foje kaj refoje: "Ni jam transformis la plej malfacilan Taŭnigoŭ, ĉu ankoraŭ estas malfaciloj nevenkeblaj por ni en konstruado?"

Sed de kie akiri la bezonatan monon? Ankaŭ tiu ĉi demando estis de ili renkontita dum la transformado de montoj kaj riveroj. Iuj komunumanoj opiniis ke pro troa malriĉeco la brigado devas peti de la ŝtato monon kaj materialojn. Dum aliaj diris: Kiel la ŝtato povus fari konstruadon, se ĉiuj tion petus de ĝi? La ĝusta solvo devas esti venki la malfacilojn per siaj propraj fortoj plene utiligante favorajn kondiĉojn de la montregiono por trovi pli multe da produktaj rimedoj. La ĝenerala partia filio aprobis la lastan opinion. En produktado ili unue aranĝis konstruajn objektojn kiuj povas plej rapide efiki. Ni prenu forstumadon kiel ekzemplon. En la jaro 1956, ili plantis purpurajn salikojn, kiuj donis enspezon de pli ol 5,000 juanoj en la sama jaro, kaj ili kulturis grenplantojn inter arbo kaj rikoltis ĉiujare 25-30 tunojn da greno. En konservado de akvo kaj grundo, ili atentis ĉefe pri sedimenta kampo. Tia kampo formita de sedimentado donis riĉan rikolton en la sekvinta jaro post sia apero. Tio altigis la aktivecon de la

komunumanoj kaj liveris monrimedojn al la produktado.

## ANTAŬE STERILA PLAĜO, NUN FEKUNDA KAMPARO

Dank' al la ampleksa disvolvo de konservado de akvo kaj grundo, la agrikultura produktado de tiu ĉi brigado disvolviĝis en certa grado, tamen la pliprodukto ne estis tiel rapida pro la malbonaj produktaj kondiĉoj. Por ŝanĝi tiun staton, la ĝenerala partia filio de Kjuju-brigado decidis konstrui kampojn sur la plaĝo de la Flava Rivero okcidente de la vilaĝo.

La plaĝo 0.75 kilometron larĝa kaj 5 kilometrojn longa estis ĉiam dezerta en la pasinteco pro ofta inundo de la Flava Rivero. La komunumanoj sub la gvido de Vang Hajjuan unue konstruis grandan digon ĉe la bordo, starigis forstozonon por eviti damaĝon de la rivero. Poste ili fosis sur la plaĝo kanalon por precipiti koton kaj sablon de monta torento kaj forkonduki klaran akvon al la Flava Rivero. Ĝis la jaro 1962, sur la pli ol 4,000 muoj da plaĝokampoj aperis sedimento pli ol du metrojn dika. Dank' al tio, la plaĝo fine fariĝis ebena fekunda kamparo.

En la lernado de Daĝaj en agrikulturo, la Kjuju-anoj konstruis irigacian kaj drenan sistemon, kiu povas akvumi la tutan brigadon, tiel ke la brigado akiris riĉan rikolton de greno jaron post jaro. Kaj la pliprodukto de greno siavice kreis favoran kondiĉon por pluapaŝa konservado de akvo kaj grundo. De la jaro 1955, ili forstumis pli ol 3,000 muojn da montkampo por pluapaŝe redukti la perdon de akvo kaj grundo. Nun ilia forstigita areo atingis 10,000 muojn inter kiuj 3,500 estas de fruktarboj.

## PROSPERA MONTVILAĜO

Dank' al la diligenta laborado de Kjuju-anoj dum la lastaj dudek jaroj, la vilaĝo fariĝis tute nova. En la jaro 1972, la brigado ankoraŭ akiris bonan rikolton de greno malgraŭ la trosekeco nevidita dum la lastaj cent jaroj.

Nun la arbidoj jam fariĝis arboj, kaj kvinono de la fruktarboj jam komencis frukti. Ankaŭ iliaj paŝtado kaj aliaj flankokupoj disvolviĝis senprecedence. Multe kreskis la nombroj de iliaj muloj, ĉevaloj, porkoj kaj ŝafoj. Antaŭe ili havis 100 porkojn dum nun jam 2,000. Ili fondis muelejon, vinagrejon, olepremejon, farejon de plektaĵoj, maŝinriparejon k.a. 22 flankokupajn entreprenojn. La ĉiujara enspezo de flankokupoj sole jam superis la tutjaran totalan enspezon en la komenca periodo de la kooperativo.

Dum la lastaj pli ol dek jaroj la investo de la brigado por fundamenta konstruado atingis pli ol 1,000 ,000 juanojn. Ili starigis pli ol 10 kilometrojn da malalttensia elektra linio, aĉetis 4 traktorojn, 40 elektrajn motorojn, 8 ilmaŝinojn kaj multajn aliajn agrikulturajn kaj flankokupajn maŝinojn en diversa grandeco, kio plialtigis la mekanikan nivelon de plugado, irigaciado, transportado kaj prilaborado de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj. Nun la vivo de la komunumanoj estas ĉiam pli bona. Iuj elmigrintoj antaŭ la Liberiĝo venis al Kjuju kaj vidinte la gigantan ŝanĝiĝon de sia hejmloko diris kun emocio: "Neniu atendis ke ankaŭ Kjuju-anoj povas ĝui tian feliĉan vivon!"

*Grasaj brutoj de Kjuju-brigado*



# La Ĉefaj Riveroj de Ĉinio


NIA lando abundas je riveroj kaj havas pli ol 1,500 riverojn kies baseno superas 100 kvadratajn kilometrojn.

La plejparto de ili estas riveroj fluantaj eksteren. La ĉefaj el tiuj riveroj, kiuj fluas orienten en Pacifikon, estas Jangzi-rivero, la Flava Rivero, Hejlong-rivero, Perlo-rivero, Hajhe kaj Huajhe; la ĉefaj riveroj fluantaj suden en la Hindan Oceanon estas Jalucangpo, Nugiang k.a; norden en la Arktan Oceanon fluas Irtiŝ-rivero en la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono.

Jangzi, la Flava Rivero, Hejlong-rivero, Perlo-rivero, Hajhe kaj Huajhe estas la ĉefaj riveroj de nia lando.

Jangzi estas la plej longa rivero de nia lando. Ĝi fontas en Kokohili-montaro en la okcidenta parto de Kinghaj-provinco kaj fluas orienten en la Orientan Ĉinan Maron ĉe Ŝanhajo tra Kinghaj, Tibeto, Junnan, Siĉuan, Hubej, Hunan, Gianghi, Anhuj, Giangsu kaj Ŝanhajo. Ĝia tuta longeco estas pli ol 5,800 kilometroj, kaj la areo de ĝia baseno estas 1,800,000 kvadrataj kilometroj, kiuj okupas kvinonon de la tuta areo de nia lando. Jangzi estas aorto de transportado kaj tre oportuna al navigacio.

La Flava Rivero estas la dua longa rivero de nia lando. Ĝi fontas ĉe la norda piedo de Bajankara-montaro en Kinghaj-provinco kaj fluas orienten en Bohaj-maron ĉe Ŝandong tra Kinghaj, Siĉuan, Gansu, Ninghia, la Interna Mongolio, Ŝenhi, Ŝanhi,



Henan kaj Ŝandong. Ĝia tuta longeco estas pli ol 4,800 km. kaj la areo de ĝia baseno estas 740,000 kvadrataj kilometroj. La baseno de la Flava Rivero estas fontloko de la historio de nia lando kaj lulilo de nia nacia kulturo.


La meza parto de Hejlong-rivero formas parton de la landlimo inter Ĉinio kaj Sovetunio. Ĝia supra parto en la nordo nomata Ŝilka fontas ĉe la orienta piedo de Kentaj-montaro de la Mongola Popola Respubliko. La alia supra parto en la sudo nomiĝas Ergune-rivero, kiu havas tri branĉojn, el kiuj unu nomiĝas Hajlar-rivero. La lasta fontas de la okcidenta deklivo de Dahing-anling-montaro de Hejlonggiang-provinco. La norda kaj suda partoj kuniĝas ĉe Logu-rivero okcidente de Mohe kaj oriente de tiu loko ĝi nomiĝas Hejlong-rivero. Ĝi fluas tra Sovetunio en Oĥockan Maron. La longeco de la parto de Logu ĝis la fino estas 2,850 km.

Perlo-rivero estas la plej longa rivero de la suda parto de nia lando. Ĝia supra parto konsistas el tri fluoj, nome la Okcidenta, Norda kaj Orienta Riveroj, el kiuj la plej longa estas la Okcidenta Rivero. Tiu ĉi estas la trunko de Perlo-rivero, fontas el Vumeng-montaro en la orienta parto de Junnan-provinco kaj enfluas en la Sudan Ĉinan Maron ĉe Guangdong. Ĝia tuta longeco estas pli ol 2,400 km. La areo de la baseno de Perlo-rivero estas pli ol 420,000 kvadrataj kilometroj. Perlo-rivero fluas tra la subtropika zono abunda je pluvo. Kaj kun densa rivero-reto kaj ĝia transporta kvanto okupas la duan lokon de nia lando post tiu de Jangzi-rivero.

Hajhe fontas en la montaro de la provincoj Hebej kaj Ŝanhi. Ĝia supra parto konsistas el la Norda Kanalo, Jongding-rivero, Daking-rivero, Zija-rivero kaj la Suda Kanalo, kiuj kuniĝas ĉe Tiangin kaj de tie la malsupra parto nomiĝas Hajhe. Ĉ. 70 km. oriente de Tiangin Hajhe fluas en Bohaj-maron ĉe Dagukoŭ. La areo de la baseno estas pli ol 265,000 kvadrataj kilometroj, inkluzive de la plej-parto de Hebej, parto de la provincoj Ŝanhi kaj Henan, kaj la urboj Pekino kaj Tiangin. Hajhe estas ĉefa vojo de Tiangin kondukanta al la maro.

Huajhe, kies trunko fontas en Tongbaj-montaro de Henan-provinco, tra Anhuj fluas orienten en Hongze-lagon de Giangsu kaj poste tra la Granda Kanalo en Jangzi-riveron. La tuta longeco de Huajhe-rivero estas ĉ. 1,000 km. kaj la areo de baseno 160,000 kvadrataj kilometroj. Huajhe havas multajn branĉojn kaj lagojn kaj ĝia baseno situas en malalta kaj ebena regiono kaj abundas je riĉfontoj kaj produktaĵoj.

*Granda Digo de la Flava Rivero*





# Brilo de Naviga Signal-lanterno

ESTIS profunda nokto. Sur la maro ruliĝas ondoj en ŝtormo. Luktas tie je pli ol 15 kilometroj fore de la kontinento maljuna kompartiano membriĝinta en 1940, kiu ĉiam tenas la signal-lanternon brila por konduki ŝipojn en havenon. Li estas Ĉen Hengcaj, membro de Vejhing-brigado de Marfiŝada Komunumo, Ŝejang-gubernio, Giang su-provinco. Li jam trapasis tutajn dek jarojn sur la maro en la batalo kontraŭ la ruliĝantaj ondegoj.

## EKLOĜI SUR MARO

Kiam fiŝistoj vidas de malproksime la brilan navigan signal-lanternon vespere sur la revena vojo, ĉiuj laŭdas: "Jen la hejmo de la maljuna kompartiano Ĉen Hengcaj!"

Iun tagon en la jaro 1962, kiam la membroj de la partia komitato de la komunumo diskutis pri asigno de laboranto sur la lumturo, Ĉen Hengcaj venis kaj diris: "Asignu la taskon al mi!" Tiu neatendita postulo mirigis ĉiujn. Ĉar ili sciis, ke Ĉen estas maljuna kamarado, kiu aliĝis al la armeo en 1939 kaj vundiĝis en batalo. Li faris meritojn en la pasinta militado. Nun li laboras jam tre pene sur la kontinento pro malsano, por ne paroli pri luktado sur la maro. Kaj krome lia familio kun multaj membroj bezonas lian prizorgon. Post diskutado, la komitato ne konsentis lian peton.

Jen malpacienciĝis Ĉen Hengcaj. Ĉar la afero ondis jam plurajn tagojn en lia cerbo. Li pensis, ke en la militaj tagoj li ĵuris al la Partio: "Mi luktos la tutan vivon por komunismo!" Kaj hodiaŭ, sub la direktado de la ĝenerala linio por socialisma konstruado, rapide disvolviĝas la fiŝkaptado, kiu multe bezonas sekurecon . . .

Nokte li longe ne povis endormiĝi. Li sciis ke la malkonsento de la partia komitato signifas zorgon pri li. Li komprenis ankaŭ ke la laboro farita de li en la pasinteco por la Partio estis jam lia pasinta faro, kaj nun li ankoraŭ devas diligente labori por la Partio. Ju pli li pripensis, des pli li emociiĝis. Li tuj vekis sian plejaĝan filon por ke la lasta skribu anstataŭ li peton por "bone prizorgi la navigan signal-lanternon por la Partio".

En la sekvinta mateno, kiam la oriento ĵus elkrepuskiĝis, li jam vizitis Jin Ĉunhe, sekretarion de la komunuma partia komitato. Li elpoŝigis la petskribon kaj diris sincere: "Mi dankas pro la zorgo de la Partio al mi. Sed, kiel kompartiano, mi devas batali tie kie estas malfaciloj. Mi petas ke vi konsentu mian peton!" Maljuna Jin forte premis lian manon kaj diris: "Kamarado Hengcaj, vi vere estas maljuna kamarado multe spertinta revoluciajn provojn!"

## PENADO DONAS ĜOJON

Estas malfacile imageble kiel kamarado Ĉen Hengcaj travivis la lastajn dek jarojn sur la maro.

La meza parto de la ligna lumturo estas tabula ĉambro 3.2 metrojn longa, 2.4 metrojn larĝa kaj 2.3 metrojn alta, en kiu oni povas sin ŝirmi kontraŭ vento kaj pluvo. Krom la ĉambreto estas nur simplaj lignaj framoj. Kiam flusas, tie etendiĝas senlima maro, dum malfluso aperas nur sablejo. Tutan tagon muĝas ventego kaj maro, plaŭdas ondoj kaj leviĝas tajdo. Tamen ĉio ĉi tio estas nenio por Ĉen Hengcaj. Dum la pasintaj dek jaroj, li venkis sennombrajn malfacilojn kun obstineco.

La greno, brulligno kaj akvo bezonataj de li estas alportitaj de la kontinento en difinita tempo. Se ventego daŭras en dek tagoj aŭ duonmonato, ŝipoj ne povas elhaveniĝi, tiam malfaciliĝas por li la vivo. En aŭgusto de la pasinta jaro, pro ventego mankis al li greno kaj dolĉa akvo. Tamen, kompartiano Ĉen Hengcaj persistis je kvar diurnoj kaj garantiis ĉiaman briladon al la naviga signal-lanterno.

Malfaciloj troviĝas ankaŭ en lia loĝado. Somere en lia ĉambro kun maldikaj tabulaj muroj estas tiel varme kiel en vaporumujo, ke li devas grimpi

sur la trabon sub la lampo-framo por tie ĝui malvarmecon de mara vento, dum vintre la ĉambro estas ĉie areopenetrebla. Kaj li zorgas ankaŭ pri tondado de siaj haroj . . .

Kiom bagatelaj estas la gigantaj malfaciloj por la avangarda batalanto de la proletaro!

En la tradicia Printempa Festo, oni kutime revenas eĉ de malproksime por ĝoje celebri la festotagon kune kun siaj familianoj, dum Ĉen Hengcaj neniun fojon pasigis ĝin en sia hejmo en tiuj dek jaroj. La partia komitato multe zorgis pri tiu maljuna kompartiano kaj foje antaŭ la Printempa Festo la sekretario de la komitato persone iris al la lumturo por revenigi Ĉen Hengcaj hejmen, sed tion li rifuzis. Li diris: "Mi ne povas forlasi la lumturon, ĉar ne ĉiuj fiŝŝipoj revenis. Se la aliaj feliĉe pasigos la festotagon, tiam ankaŭ mi sentos ĝojon."

## PERSISTE ĈE SIA POSTENO

Kiom da penigaj laboroj Ĉen Hengcaj jam faris dum tiuj longaj dek jaroj!

Iuvespere de januaro, 1972, grandaj neĝflokoj flirtis en norda ventego, kaj la firmamento kaj la maro arĝentis sendiference. La lumturo ŝanceliĝis en la vento. Kiel antaŭe, Ĉen Hengcaj volis kontroli la signal-lanternon antaŭ vesperiĝo. Sed post multfoja ŝaltado, ĝi ankoraŭ ne lumis. Senhezite, li ekprenis kontrolan instrumenton kaj komencis grimpi al la pinto de la lumturo pli ol tri metrojn alta. Neĝeroj frapis la vangojn de Ĉen Hengcaj kaj la kruta turŝtuparo estis kovrita de neĝo. Li devis forbalai la neĝon sur la ŝtupetaro ŝtupon post ŝtupo. Tri fojojn li surgrimpis la turpinton, tamen ankoraŭ ne trovis la kaŭzon. Kaj tiam liaj membroj jam frostiĝis. Jam krepuskiĝis. Ĉen Hengcaj brule maltrankviliĝis, pensante ke fiŝŝipoj revenos al haveno por sin ŝirmi kontraŭ vento kaj neĝo. Post pli-ol-unu-hora zorga kontrolado li fine riparis la difekton kaj briligis la navigan signal-lanternon. Sed tiam Ĉen Hengcaj eksentis doloron en la tuta korpo. Kiom da fojoj Ĉen Hengcaj jam renkontis tian veteraĉon kaj tian danĝeron sur la maro dum la dekjara batalado!

## LIA DAŬRIGANTO

Dank' al la direktado de la ĉiam brilanta naviga signal-lanterno, al la fiŝŝipoj neniam okazis akcidento dum la dek jaroj.

Iutage, sidante sur la pinto de la lumturo, Ĉen Hengcaj rigardis la torentajn ondojn kaj pensis en si: La ondoj de la Flava Maro sekvas unu alian kaj la revolucian aferon daŭrigas generacio post generacio. Kiel homo kun aĝo de pli ol 50 jaroj, li devas frue kulturi junulon por daŭrigi sian laboron. Kiu do taŭgas por daŭrigi tiun ĉi malfacilan kaj danĝeran laboron? Je tio aperis en lia cerbo lia dua filo Keven, kiu kreskas en la nova socio kaj devas esti hardita en tia forno por fariĝi ŝtalo. Lia opinio trovis aprobon ĉe la partia komitato.

Printempe de la pasinta jaro, li kondukis Keven al la turo por ke li lernu zorgadon pri la lanterno. Nokte, rigardante al la nigra maro kaj aŭskultante plaŭdadon de la ondoj, la 15-jara Keven ektimis pensante ke li devas longe vivi tie en la estonteco, kaj li diris al sia patro: "Morgaŭ mi reiru al la hejmo!"

Tio estis antaŭatendita de Ĉen Hengcaj.

Frumatene, Ĉen Hengcaj refoje kondukis sian filon al la turpinto. Ili rigardis la arbare starantajn mastojn kaj la maron plenan de ĝojo en kaj ekster la haveno.

"Keven, ĉu bona estas la loko?" demandis Ĉen Hengcaj al sia filo.

"Kompreneble bona!" Keven respondis kun ĝojo.

"Sed, antaŭ la Liberiĝo ĉi tie estis loko plena de suferoj de malriĉaj fiŝistoj."

Tiam Ĉen Hengcaj ekrakontis al sia filo pri la amara pasinteco: En la malnova socio, la familio de Ĉen Hengcaj fiŝkaptadis por fiŝtirano generacio post generacio. Foje, la patro de Ĉen Hengcaj fiŝadis por la tirano kaj renkontis ventegon sur la revena vojo. En nigra nokto, li ne povis enhaveniĝi pro manko de naviga signal-lanterno, kaj fine lia ŝipo trafis rifon kaj dronis en maro . . .

"Dank' al la gvido de la Kompartio kaj Prezidanto Maŭ," diris Ĉen Hengcaj, "la tutlandaj laboruloj konstruas socialismon kaj vivas feliĉan vivon.

"La tasko de zorgo pri lumturo asignita de la partia komitato de la komunumo al ni estas servo al la popolo kaj postenado por la revolucio. Kiu plenumu la taskon, se ne la posteuloj de ni malriĉaj fiŝistoj!"

Post la edukado de sia patro, Keven faris firman decidon. De tiam, li ĉiam kaj ĉie diligente lernis kun sia patro kiel ekzemplo kaj fine mastris la teknikon pri zorgo de la lanterno. Nun la juna Keven laboras sola sur la maro jam dum unu vintro kaj unu printempo, kaj li laboras tiel bone kiel lia patro.



# Nova Vilaĝo Linji

EN la sudorienta regiono de la provinco Ŝanhi troviĝas vilaĝo Linji — la sidejo de la Linji-a Produkta Brigado.


Kiam vizitantoj venis al la vilaĝo, ili estas tuj allogataj de ĝia beleco. La vilaĝo sin ŝirmas per arboj. Ambaŭflanke de ĝiaj larĝaj stratoj bonorde staras novaj brikdomoj unuj apud aliaj, kio donis belan kaj agrablan impreson. Oriente de la vilaĝo troviĝas pom-ĝardeno, okcidente arbaro por ligno, sude arbidkulturejo kaj norde morusarbaro. Starante sur altaĵo oni povas vidi, ke la 800 muoj da kampoj de la brigado estas dividitaj de vicoj da arboj en 16 kvadratajn terpecojn kaj ĉe ĝiaj ĉirkaŭaj limoj estas forstozono protektanta la kampojn kaj la vilaĝon.

Linji-brigado kun 687 loĝantoj el 140 familioj posedas 1,300 muojn da agro. En la pasintaj pli ol 20 jaroj, dank' al la supereco de la kolektiva posed-sistemo kaj la spirito de penema luktado, tiu brigado disvolvis multflankan produkton, firme sekvante la vojon montritan de Prezidanto Maŭ. Antaŭ la Liberiĝo tie la pomua produktokvanto de greno estis nur 30-35 kg. kaj en 1972 tiu jam atingis 541 kg. En la lastaj dek jaroj tiu brigado liveris al la ŝtato 635,000 kg. da greno kaj havas 150,000 kg. por rezervo. Krome, Linji posedas 148,000 arbojn, el kio ĝi ĉiujare enspezas pli ol 20,000 juanojn. La produktokvanto de lino, tabako, tangŝen-o (*Codonopsis pilosula*) kaj aliaj ekonomiaj plantaĵoj estis senĉese pligrandigita. La brigado bredas pli ol 700 porkojn. Ĝia mekanikiga nivelo altiĝas iom post iom. Nun ĝi havas 150 traktorojn, motorojn, draŝmaŝinojn kaj aliajn agrikulturilojn, tiel ke multaj pezaj laboroj estas plenumataj de maŝinoj. La brigado ankaŭ starigis malgrandan fabrikon por fari pumpilojn, draŝilojn, gren-prilaborajn maŝinojn kaj malgrandajn agrikulturilojn.

Sekve de disvolviĝo de la produkto multe pliboniĝis kaj altiĝis la materia kaj kultura vivo de la komunumanoj. En la jaro 1972, ĉiu komunumano ricevis po 250 kg. da greno kaj plejparto de iliaj familioj deponas monsumon en ŝparkaso. Antaŭ la Liberiĝo neniu havis ŝancon viziti lernejon, sed nun funkcias lernejo de sepjara lernosistemo kaj ĉiuj lernaĝaj infanoj lernas en ĝi. Ĝis nun ĝi jam havas pli ol 300 diplomitojn de elementaj kaj mezgradaj lernejoj. En la jaro 1969 la brigado efektivigis senpagan kuracadon al siaj membroj.

Kia ĝi estis antaŭ 60 jaroj? Tiutempe ĉi tie estis nur herboza marĉejo kun nenia vojo. En 1909 iuj malriĉaj kamparanoj de Linhian-gubernio de Henan-provinco fuĝis ĉi tien, devigite forlasinte sian hejmlokon pro kruela ekspluatado de bienuloj, kaj starigis budojn ĉe la marĉejo. Tage ili eliris por almozpetado; matene kaj vespere ili ekspluatis la virgan teron. Poste plimultiĝis ilia nombro kaj iom post iom formiĝis malriĉa vilaĝo. La loĝantoj donis al la vilaĝo la nomon "Linji" (transloĝantoj de Linhian), por ke la posteuloj ne forgesu la pasintecon.

La virga tero antaŭe estis sen mastro, sed, post ekspluatado de la virga tero fare de la rifuĝantoj, bienuloj kaj lokaj tiranoj devigis ilin pagi terrenton kaj imposton de loĝado. Plejparto de iliaj laborfruktoj estis forprenita de bienuloj. En la jaro 1943, kiam okazis trosekeco, ĉiuj grenplantaĵoj ruiniĝis sen rikolto. El la 62 familioj de la vilaĝo mortis 24 homoj pro malsateco. Kam-




*Pomkolektado*

parano Han Cajze kaj liaj kvar familianoj ĉiuj mortis de la katastrofo.


En la jaro 1945 la malriĉaj kamparanoj de Linji-vilaĝo liberiĝis kaj fariĝis mastroj de la ŝtato. Por disvolvi la produkton kaj iri la vojon kondukantan al komuna riĉiĝo, la Linji-anoj aktive respondis al la alvoko de Prezidanto Maŭ pri "**organiziĝo**", fondis interhelpajn grupojn, agrikulturan kooperativon kaj starigis popolan komunumon en la jaro 1958. Por ŝanĝi la postiĝintecon la partia filio de Linji kondukis heroan batalon kontraŭ la naturo kun la amasoj sub sia gvido. Penlaborinte dekkelkajn jarojn, ili fine donis al sia hejmloko la novan fizionomion.

Ĉar la kampoj eksplutitaj sur la marĉo estis alkaloza, la nivelo de subtera akvo alta kaj la tertemperaturo malalta, la pomua produktokvanto de greno de Linji estis tre malgranda dum la pasintaj multaj jaroj. La partia filio mobilizis la komunumanojn por disvolvi amasan kampanjon de produkto. Unue ili faris forstokulturadon, tio povas ne nur sorbi alkalon sed ankaŭ moderigi klimaton. Dum tri jaroj ekde la jaro 1957 ili plantis 130,000 arbidojn. Por plibonigi grundon la komunumanoj sub la gvido de la partia filio portis ruĝan argilon de alia vilaĝo al la kampoj. Poste ili ŝanĝis la metodon kaj kondukis per kanaletoj riverakvon por sedimentigi ruĝn grundon en siajn kampojn, tiel ke pli ol 800 muoj da agro estis plibonigitaj. En la jaro 1964 Prezidanto Maŭ elmetis la alvokon "**lerni de Daĝaj en agrikulturo**", la komunumanoj pluapaŝe levis altan tajdon de produkto, aktive konstruis irigaciajn kanalojn kaj fosis putojn, kio kreis pli favorajn kondiĉojn por pliprodukti grenon. Nun Linji-brigado starigis pumpoputon sur ĉiu terpeco kun areo de 50 muoj. Nun la rikolto de tiu brigado ĉiujare estas fundamente garantiata.

*La hieraŭa Linji*



# Nova Vilaĝo Linji



Angulo de la nova vilaĝo



Kolzoj





Pomarba Ĝardeno



(Maldekstre) Ĉirkaŭ la vilaĝo kaj ambaŭflanke de vojoj ĉie troviĝas ombroriĉaj arboj.

(Dekstre) Li Longtaj, la partifilia sekretario de la brigado, laboras kune kun la komunumanoj en la frukto-ĝardeno.



Verdaj tritik-kampoj






Nun la ąlmigrintaj maljunuloj vivas feliĉan vivon.


Post laboro





La sanitarejo de la brigado

Antaŭ la Liberiĝo rifuĝantoj venintaj de aliaj lokoj trafitaj de natura katastrofo loĝis en tia domaĉo.



# Kalisterka Fabriko sur Sala Lago

LA Kalisterka Fabriko de Ĉaerhan estis konstruita sur la sala lago Ĉaerhan en Cajdambaseno okcidente de Kinghaj-provinco. Utiligante la karnaliton en la lago kiel ĉefan materialon, ĝi produktas kalian kloridon kaj kali-sterkon bezonatajn de industrio kaj agrikulturo.

La sala lago Ĉaerhan kun ĝia sekigita parto ampleksas pli ol 5,800 kvadratajn kilometrojn. Pro longdaŭra vaporado kaŭzita de la suno kaj vento ĝi perdis grandan kvanton da akvo kaj ĝia surfaco fariĝis dika sal-kovraĵo tiel fortika, ke oni povas konstrui sur ĝi fabrikdomojn. Krom salo la ĉiutagaj vivbezonaĵoj de la loĝantoj en tiu loko devas esti alportataj de aliaj lokoj. Tie la somera temperaturo atingas 40°C kaj la vintra malaltiĝas ĝis -30°C.

La malbonaj naturaj kondiĉoj kaŭzas al la laboristoj kaj oficistoj de la fabriko multajn malfacilojn kiel en la vivo tiel en la produktado. Tamen, kun plena revolucia fervoro ili penlaboris venkinte malfacilojn unu post alia. En la pasintaj 10 jaroj de 1963 ĝis 1972 tiu fabriko kun pli ol 400 laboristoj pliigis 10-oble produkton de kalia klorido sen pliigo de ekipaĵoj. Samtempe altiĝis la kvalito kaj malleviĝis la konsuma kvanto de krudaj materialoj kaj produktokosto. La meznombra jara produktovaloro de ĉiu persono de la fabriko nun pliiĝis de pli ol 900 juanoj de la jaro 1963 ĝis pli ol 18,000 juanoj.

En la jaro 1972 la ŝtato asignis al la fabriko produktan taskon de 10,000 tunoj da kalia klorido, tiom ĝi neniam produktis antaŭe. En la komenco al ĝi mankis laborfortoj.

En la pasinteco la kalisterka fabriko mem ekspluatis kaj transportis ercon. Por produkti dekmil tunojn da kalia klorido oni bezonas cent dudek mil tunojn da erco. La erco-ekspluatejoj lokiĝis dise kaj la plej malproksima distancas je 10 kilometroj fore de la fabriko, la ekspluato bezonis multajn laboristojn kaj kaŭzis al la produkto de laborejoj akran mankon de laborfortoj. Kion fari? La laboristoj diris: La ekspluatado kaj produktado devas esti samtempe faratаj. Ili proponis reformi kaj bone utiligi la malnovajn ekspluatejojn en proksimo de la fabriko. Akceptinte tiun proponon la gvidantoj de la fabriko mobilizis la laboristojn kaj oficistojn por reformi pli ol 500,000 kvadratajn metrojn da malnovaj ekspluatejoj kaj ricevis de ili ĉ. 30,000 tunojn da erco.

Por produkti kalian kloridon unue oni devas malkombini ercon en dolĉa akvo. Antaŭe la akvo bezonata de tiu fabriko estis alkondukita el proksima rivero. En junio de la lasta jaro la riverakvo subite malaperis. La laboristoj kaj oficistoj tre maltrankviliĝis vidante ke la problemo estas ne solvita en longa tempo. Fine ili decidis sendi esploran grupon por serĉi akvon.

La grupo trovis alian riveron kun abunda akvo okcidente de tiu rivero. Por utiligi ĝian akvon oni devas konstrui kanalon longan je dek kilometroj inter la du riveroj. Tiu ĉi laboro estis peniga kaj malfacila, tamen la laboristoj diris, ke por funkciigi la produkton oni devas konstrui la kanalon. Ili fosis 170,000 kubmetrojn da tero kaj fine alkondukis torentan akvon.

La tekniko-renoviga grupo de la fabriko vigle aktivadis en la produktado. Ili reformis traktoron en fosmaŝinon, kiu altigis la laborefikon ok-oble ol antaŭe. Oni antaŭe devis elpreni la produktaĵon ŝovelilon post ŝovelilo el centrifugilo. Tia laboro estis laciga kaj la laborefiko malalta. La grupo instalis al la centrifugilo skrapilon, tiel ke la produktaĵo povas aŭtomate elŝutiĝi.

En la produktado, la Kalisterka Fabriko de Ĉaerhan senĉese plibonigis siajn ekipaĵojn kaj komencis uzi maŝinojn de la ercoekspluatado ĝis transportado de la produktaĵo. Nun la laboristoj kaj oficistoj kun plena memfido diligente laboras por gajni pli bonajn atingojn en la jaro 1973.

JAN GIANGVEN:

# Por Elimini Termitojn

AMBAŬBORDE de Giulong-rivero en Fugian-provinco vaste cirkulas rakonto pri eliminado de termitoj fare de Lin Jici.

La afero komenciĝis jene: Pasintjare Lin Jici kaj liaj kolegoj trovis grandan termitejon ĉe iu parto de Giulong-rivera kontraŭinunda digo, kiu kuŝas en Longhaj-gubernio. La ĉefa nesto de tiu termitejo altis je 1.2 metroj kaj larĝis je 1.5 metroj, kaj ĉirkaŭ ĝi troviĝis pli ol 100 malgrandaj branĉaj nestoj. Ili kaptis la termito-reĝon kaj -reĝinon (la termito-reĝino longis 63 milimetrojn). La termito vivanta en suda Ĉinio estas insekto malutila al akvoutiligaj konstruaĵoj, kiaj riveraj baraĵoj kaj digoj. Tiuj termitoj konstruas siajn loĝejojn interne de la digo, kaj ili traboras la eksteran kaj internan deklivojn de la digo por trovi manĝaĵon kaj akvon. Kiam superakvego alvenas kaj trafluas la traboritajn truojn, la digo breĉiĝas. Tio kaŭzis grandan damaĝon al la agrikulturo, industrio kaj popola vivo. En antikveco de Ĉinio jam cirkulis la diro: "Digo kun longeco de mil kilometroj breĉiĝas nur pro unu termitejo."

En majo de 1967 la gvidanto sendis Lin Jici al kurso organizita de la provinca akvoutiliga fako por fari studon pri elimino de termitoj. Tiam li dubis, ĉu li estos kompetenta en tiu laboro, ĉar li neniam antaŭe sin okupis pri tio. Sed li finfine decidis bone plenumi la novan taskon, kiam li rememoris sian tragikan travivaĵon.

En la jaro 1946 antaŭ la Liberiĝo, Liangiang-gubernio — la hejmloko de Lin Jici, suferis de inundego. La kuomintanga registaro longtempe ne riparis la digon de Aŭgiang-rivero kaj ankaŭ la termitoj faris detruon al ĝi, tiel ke la akvego senbare enfluis ĉie tra la breĉojn de la digo kaj la gubernia urbo fariĝis akvovastaĵo. Centoj da loĝantoj perdis aŭ sian hejmdomon aŭ sian vivon. Ankaŭ la familio de Lin Jici estis inundita. Lia fratino dekkelkjara en akvo kriis helpon. Sed nun sub la gvido de la Partio kaj Prezidanto Maŭ, la nove starigitaj kontraŭinundaj digoj de Aŭgiang-rivero sekurigas la loĝantaron laŭlonge de la rivero kaj dekmilojn da muoj da kampoj, kiuj donis bonajn rikoltojn en la lastaj sinsekvaj jaroj. Lin Jici konsciis, ke li, kiel digprotekta laboristo, havas neeviteblan devon por ekstermi termitojn kaj protekti la digojn.

Por kiel eble plej rapide koni la agadon kaj kutimon de la termitoj, Lin Jici modeste lernis de tiurilataj specialistoj, teknikistoj kaj maljunaj kamparanoj. Malgraŭ en pluvoza printempo aŭ varmega somero, li iris al la digo preskaŭ ĉiutage por esplori la termitojn aŭ fosi iliajn vojojn kaj nestojn. Li trovis, ke la termitoj ofte serĉas manĝaĵon inter putraj herbamasoj, sub ŝtonoj, longanarboj aŭ radiko de sukerkanoj. Se oni trovis termitojn en tiuj lokoj kaj sekvis ilian spuron, oni povas pli

*Lin Jici en analizo pri termitejo*



facile trovi iliajn enirejojn sur la diga deklivo. Tiuj enirejoj kunligas la termitejon kaj la traboritajn vojojn en la digo. La vojoj formas la krucîĝajn trunkajn kaj branĉajn trafik-liniojn. La trunkaj dikiĝas je ĉ. 4 centimetroj kaj la branĉaj similas al tiuj de la griloj aŭ lumbrikoj, tial estas malfacile fari distingon. Sekvante la termitan trafikan linion oni povas trovi la termitejon. La termitejo estas dividita en ĉefan kaj branĉajn nestojn. En ĉiu termitejo estas nur unu ĉefa nesto, kie estas ĉambro por la termito-reĝo kaj -reĝino. Ĉirkaŭ ĝi dislokiĝas la branĉaj nestoj, kies nombro iafoje atingas eĉ pli ol cent.

Post kelkjara praktikado Lin Jici bone konas la leĝojn de la agado de la termitoj. Termitoj estas insektoj kolektive loĝantaj kaj okupiĝantaj respektive pri malsamaj laboroj. Inter ili sin trovas labor-termitoj, milit-termitoj, gener-termitoj, termito-reĝo kaj -reĝino. La labor-termitoj havas taskon konstrui la neston kaj trafikajn liniojn sub la tero, serĉi manĝaĵon kaj manĝigi termitidojn. La milit-termitoj estas defendantoj de la termitejo, kiuj gardstaras kaj militas kontraŭ malamikoj. La gener-termitoj estas antaŭuloj de la termito-reĝoj kaj -reĝinoj, sed ili generas idojn ne en la antaŭa nesto. La termito-reĝo kaj -reĝino estas kreantoj de la termitejo, kaj ĉiuj aliaj termitoj en la termitejo estas iliaj idoj. Tio montris, ke oni povas ekstermi la termitojn nur per mortigo de la termito-reĝo kaj -reĝino.

Ne estas facile trovi termitejojn sur digo kun longeco de centoj da kilometroj. Dum laboro Lin Jici akiris multan sperton. Li trovis, ke se peco da herboj sur la digo velkus en somero aŭ aŭtuno, tio povus esti kaŭzita de la suĉado de akvo fare de termitoj, sub tiuj herboj eble troviĝus termitejo. Kelkfoje li elfosis termitejon, sed ne trovis la termito-reĝon kaj -reĝinon, kaj tiaokaze li ĉiam zorgeme esploris la ĉirkaŭaĵon. Unu fojon, laŭ la vivmaniero de la termitoj, kiuj ĝenerale serĉas manĝaĵon sur la malantaŭa digo-deklivo kaj akiras al si akvon sur la antaŭa deklivo, li taksis, ke la termito-reĝo kaj -reĝino forkuris laŭlonge de la malantaŭa deklivo, ĉar tie sin trovis sukerkana kampo. Post atenta serĉado li fine kaptis ilin tie.

Lin Jici ankaŭ trovis novan metodon por esplori termitan enirejon. Foje, li vidis iun tigohavan herbon sur la digo-deklivo, kaj ekmemoris, ke en sia infaneco li ofte kaptis krabojn enmetante en kavon herbtigon kun logaĵo. Ĉu oni ne povas kapti termitojn ankaŭ per tiu rimedo? Li enigis herbtigon en iun termitan enirejon kaj poste retiris ĝin malrapide, kaj li konstatis, ke multaj termitoj alkroĉiĝis al ĝi forte mordante. Poste li multe provis tiun metodon kaj ricevis bonan efikon.

Dum la lastaj 5 jaroj Lin Jici fosis 67 ĉefajn nestojn de termitoj kaj 1,300 branĉajn nestojn kaj mortigis 56 parojn da termito-reĝoj kaj -reĝinoj sur la digoj de Aŭgiang-rivero kaj baraĵoj de akvokonservejoj en la gubernio, kaj tiel faris kontribuon en protektado de la digoj kaj baraĵoj. Nun lia sperto estas disvastigata en Fugian-provinco.

La amasoj laŭdis Lin Jici pro lia sukceso en la elimino de termitoj kaj en la sekurigo de akvoutiligaj konstruaĵoj, sed li modeste diris: "Mi faris nur la unuan paŝon en la apliko de scienca metodo por elimini termitojn."

## Kurantaj Aferoj

### NOVA RADIODISAŬDIGA GIMNASTIKO POR INFANOJ

Lastatempe la Ŝtata Fizikokultura kaj Sporta Komisiono kaj la Scienca kaj Eduka Grupo sub la Ŝtata Konsilantaro publikigis la kvinan serion de radiodisaŭdiga gimnastiko por infanoj.

Ensorbinte la avantaĝojn de la antaŭaj kvar serioj, tiu ĉi serio estas kun novaj viglaj kaj kompare malfacilaj movoj de ĉiuj korpopartoj. Tiu ĉi serio sin dividas en du grupojn laŭ la malsamaj aĝoj de la infanoj. Por adaptiĝi al la karakterizaĵoj de infanoj, en tiu ĉi serio troviĝas imitado de movoj en produkta laboro kaj danco.

La gimnastiko por infanoj estas unu el la ŝatataj sportoj de ili. En la jaro 1955, Ĉinio jam publikigis la unuan serion de tia gimnastiko kaj poste sinsekve la aliajn tri. Dum la lastaj dekkelkaj jaroj tia gimnastiko disvastiĝis en diversaj elementaj lernejoj de la tuta lando kaj ludis bonan rolon en fortikigo de la korpo de infanoj.

# Vojaĝo de HIAŬJUN

### BONVENON AL VI, NIA GASTETO

La 12-an de aprilo de 1972, trajno n-ro 24 veninta de nia sudokcidenta urbo Kunming malrapide veturis en la Ŝanhajan Stacion. Inter la atendantoj sur la kajo sin trovis viro kvindekjara kaj du virinoj mezaĝaj, kiuj rigardis malproksimen starante sur siaj piedpintoj.

*Ĉen Ĵonghian kaj la resanigita Hie Hiaŭjun.*



Jen ili venas! Jen ili venas! En la homamaso alfluanta de la kajo alproksimiĝas knabino kun mallongaj harplektaĵoj kun pakaĵo en unu mano kaj knabineto en la alia. "Hiaŭjun, Hiaŭjun!" vokante kuris al ŝi la tri atendantoj. Ili transprenis la knabineton kaj varme kisadis ŝiajn vangojn, dum la knabineto estis hontema, sin apogante ĉe la ŝultro de unu el la virinoj. Ŝi diris ridante:

"Saluton, avĉjo kaj avinjo!" Aŭdinte tion ĉiuj ekridis de ĝojo.

La knabino nomiĝas Ĉen Ĵonghian. Antaŭ kelkaj jaroj, kiel intelekta junulino ŝi iris al Hiŝuangbanna de Junnan-provinco por konstrui nian socialisman limregionon. Ĉi-foje ŝi revenis al Ŝanhajo por vidi siajn gepatrojn. La de ŝi alportita knabineto nomata Hie Hiaŭjun estas filino de gumlaboristo, kun kiu la knabino laboras en la sama unuo. Du el la tri atendantoj estas gepatroj de Ĉen Ĵonghian kaj la alia estas patrino de iu alia intelekta junulo.

Nun ni rakontu al niaj legantoj pri la eksterordinara vojaĝo de Hie Hiaŭjun.

### VARMKORAJ GEJUNULOJ

En gumo-rikolta sezono de Hiŝuangbanna Hie Hiaŭjun, filino de Hie Gilong, subite trafis infanan paralizon. Post resaniĝo ŝi perdis la kapablon piediri pro internen-turniĝo de la dekstra piedplando. Hie Gilong kaj lia edzino portis la filineton al multaj kuracejoj, sed la kuracado ne efikis.

La malsano turmentadis Hiaŭjun, kio maltrankviligis ne nur ŝiajn gepatrojn sed ankaŭ la laboristojn kaj gejunulojn el Ŝanhajo. Tiuj gejunuloj vivecplenaj venis ĉi tien respondante al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ pri iro de intelektaj gejunuloj al la vasta kamparo kaj mont-regiono. Dum la pasintaj kelkaj jaroj, ili penlaboradis kune kun veteranaj laboristoj por kulturi kaj flegadi la

gumarbarojn kaj starigis kun ili profundan klasfratecon en la komuna laboro. Ili diris: "La malfaciloj de maljuna Hie ja estas ankaŭ niaj, ni nepre faros ĉion por resanigi Hiaŭjun."

Iuj ŝanhajaj intelektaj junulinoj diris, ke ili vidis specialajn ledŝuojn en Ŝanhajo, kiujn oni portis por korekti siajn deformitajn piedojn. Tiam junulino Je Lianli devis reveni al Ŝanhajo por viziti sian familion kaj meminiciate prenis sur sin la taskon aĉeti tiajn ŝuojn por Hiaŭjun.

Sed Je Lianli ne sukcesis tion fari. Reveninte de Ŝanhajo ŝi diris ke tiaj ŝuoj devas esti farataj laŭ la piedoj de la malsanulo kaj ke ŝia patrino proponis porti la infanon al Ŝanhajo por kuraci.

Por atingi Ŝanhajon oni devas veturi 4,000 kilometrojn per ŝipo, aŭto kaj trajno dum sinsekvaj sep aŭ ok tagoj. Sed kiu povas porti la malsanuleton al Ŝanhajo?


Tiam junulino Ĉen Ĵonghian diris: "Mi povas plenumi tiun taskon, kiam mi revenos al hejmo por vidi miajn gepatrojn." Ŝia propono tuj ricevis aprobon de la gvidantoj.

La 2-an de aprilo Ĉen Ĵonghian kaj Hiaŭjun ekveturis. Survoje Ĉen Ĵonghian zorgeme manĝigis kaj trinkigis la infanon kvazaŭ sian propran fratineton. Veturinte dek tagojn ili sekure atingis Ŝanhajon.

## KIEL HEJME

Vespere de la tago, kiam Hiaŭjun atingis Ŝanhajon, okazis kunveno, kiun ĉeestis la gepatroj de Ĉen Ĵonghian kaj tiuj de aliaj intelektaj gejunuloj. En la kunveno Ĉen Ĵonghian prezentis al ili la bonan situacion de socialisma konstruado en la limregiono kaj la malsanon de Hiaŭjun. Poste la ĉeestantoj varme diskutadis, kiel resanigi Hiaŭjun. Ĉiuj diris, ke ili nepre klopodos por normaligi ŝian piedon kaj flegados ŝin zorgeme kiel sian propran infanon.

Matene de la 14-a de aprilo, Ĉen Ĵonghian kaj familiano de iu alia intelekta junulo portis Hiaŭjun al la Unua Popola Hospitalo de Ŝanhajo. Kiam kuracistoj sciiĝis ke la infano venis ĉi tien de la landlima provinco Junnan, ili decidis fari al ŝi operacion kiel eble plej frue. Ĉen Ĵonghian tuj telegrafis tion al la gepatroj de Hiaŭjun por ke ili trankviliĝu.



*Ĉen Ĵonghian kaj la familio de Hie Gilong*

La operaciado al Hiaŭjun iris glate kaj post nelonge ŝi elhospitaliĝis.

Laŭ la admono de kuracistoj oni mendis por la infano paron da pland-korektaj ledŝuoj por firmigi la operacian efikon. Venis somero, la knabineto kun tiaj ledŝuoj sin sentis varma. La patro de Ĉen Ĵonghian kun la infano kaj ŝiaj plastaj sandaletoj venis al ŝu-riparejo por fari la sandaletojn en plandkorektajn. Kiam la ŝuisto sciis la historion de la infano, li tuj flanken metis riparatan ŝuon kaj diris: "Kamarado, sidiĝu kaj iom atendu, mi tuj prilaboros por vi."

Reveninte al Junnan post la forpermeso, Ĉen Ĵonghian speciale skribis al siaj gepatroj leteron dirante: "La 22-a de junio estas la naskiĝa tago de Hiaŭjun. Faru ĉion por ke ŝi pasigu tiun tagon ĝoje." Je la 21-a de junio, reveninte de laboro la patrino tuj iris al magazeno, aĉetis pecon da bela ŝtofo kaj faris por Hiaŭjun jupon. La sekvintan tagon la patrino speciale preparis por ŝi bongustan vermiĉelon kun viandaĵo laŭ la ŝanhaja kutimo. Hiaŭjun, infano el la sudokcidenta parto de la Patrio, ĝoje pasigis sian kvaran naskiĝ-tagon

ĉe la nove konataj geavoj en la orienta apudmara urbo Ŝanhajo.

La 11-an de julio Hiaŭjun devis reveni al sia hejmloko sub flegado de alia intelekta junulino Gaŭ Liankin. Kiam Gaŭ Liankin atingis la stacion kune kun sia patro kaj la knabineto, tie jam longe ilin atendis la gepatroj de Ĉen Ĵonghian kaj aliaj intelektaj gejunuloj. Ili konkure brakumis la knabineton kaj diris al ŝi ke ŝi transdonu iliajn salutojn al ŝiaj gepatroj. Hiaŭjun tre ĝojis vidante la geavojn kiuj ŝin flegadis.

Kiam Gaŭ Liankin kaj Hiaŭjun envagoniĝis, la gepatroj foje-refoje diris al Gaŭ Liankin, ke ŝi bone zorgu pri Hiaŭjun dum la vojaĝo.

La trajno ekmoviĝis kaj Hiaŭjun levis siajn manetojn al la geavoj kaj ekkriis per arĝenta voĉo: "Ĝis revido, geavoj!"

## HIAŬJUN REVENIS


Hiaŭjun revenis al sia hejmo post pli ol tri monatoj. La ĝojiga informo rapide disvastiĝis tra la gumarba ĝardeno kaj multaj homoj alkuris por rigardi Hiaŭjun. Ili prenis la infanon en la sinon, ŝin pririgardis kaj kun ĝojo trovis ke ŝi multe ŝanĝiĝis: ŝia dekstra atrofiita kruro grasiĝis kaj la piedplando normaliĝis. Ĉiuj sentis neesprimeblan ĝojon kaj tio aparte ĝojigis la gepatrojn de la knabineto. Precipe la patrino de Hiaŭjun estis tre kortuŝita, kiam ŝi rememoris la amaran pasintecon. En la malnova socio ŝi estis infan-fianĉino travivinta ĉiajn suferojn kaj ofendojn kaj ŝiaj patrino, pliaĝaj frato kaj fratino mortis de malsato kaj malsano. Ŝi diris emocie al la vizitantoj: "Nun en nia socialisma patrolando ĉie troviĝas niaj parencoj. Hiaŭjun rapide resaniĝis dank' al la helpo de la kamaradoj. Ni nepre edukos nian infanon tiel ke ŝi fariĝu konstruanto de la limregiono de la patrolando kiam ŝi plenkreskiĝos."

## Kurantaj Aferoj

### POŜTMARKOJ "KANTOJ KAJ DANCOJ DE INFANOJ"

La Ĉina Poŝta kaj Telekomunika Ministerio emisiis novan serion de poŝtmarkoj "Kantoj kaj Dancoj de Infanoj".

Ĝi konsistas el kvin pecoj kun valoro de ok cendoj. Iliaj desegnoj estas elektitaj el la papertondaĵoj de Jangĝoŭ kun simplaj kaj viglaj figuroj en aparta nacia stilo. La unua peco temas pri *Jangge*-danco (de hana infano), la dua pri ludo de ĉeval-kapa kordmuzikilo (de mongola infano), la tria pri *Hada*-danco (de tibeta infano), la kvara pri mantambura danco (de ujgura infano) kaj la kvina pri longtambura danco (de kore-nacia infano). Ĉiuj ili manifestas la solidarecon kaj ĝojon de niaj diversnaciecaj infanoj.



# HANGĜOŬ—Urbo apud Lago

HANGĜOŬ, ĉefurbo de Ĝegiang-provinco, estas fame konata pro la pitoreska Okcidenta Lago.

Okcidente de Hangĝoŭ la bela Okcidenta Lago kun surfaco de 5.6 kvadrataj kilometroj estas brakumita de montoj en tri flankoj. En la lago estas du digoj Suti kaj Bajti, kiuj apartigis la Okcidentan Lagon en Lagojn Internan, Eksteran kaj Postan. "Santanjinjue" en la Ekstera Lago estas pitoreskejo kun insulo en lago kaj lagetoj en insulo. La tri pagodoj staras kiel tripiedo sur la akvosurfaco kaj sur la insulo abundas floroj kaj graciaj arboj, zigzagas ŝtonponto. Vidate dealte, la insulo similas al gemo inkrustita en la lago. En kaj ekster la lago, sur kaj sub la montoj, troviĝas multaj pavilonoj kaj kioskoj, kaj diversaj belvidejoj. En printempo, la digoj Suti kaj Bajti estas ornamitaj de ruĝaj persikfloroj kaj verdaj salikoj, en somero, sveltaj lotusfloroj ĉarmas en la Interna kaj Posta Lago; mezaŭtune, la montoj odoras per aromo de osmantfloroj, kaj dum frosta vintro plene floras umefloroj ĉe Fanghe-pavilono.

Post la Liberiĝo, plenumante la principon "servi al produkto kaj al laboranta popolo", la loĝantoj de Hangĝoŭ faris kompletan reordigon al la Okcidenta Lago. Oni dragis la lagon tiel, ke la meznombra profundeco de la lago grandiĝis de 0.6 metro ĝis 1.8 metroj. Ĉirkaŭ la lago oni plantis 30 milionojn da arboj ornamaj, materialaj kaj ekonomiaj, kulturis diversajn florojn kaj konstruis multajn parkojn. "Huagangguanju" (Rigardi Fiŝojn ĉe Flora Haveno) estas la unua el la 10 belvidejoj de la Okcidenta Lago. Sed antaŭe tie estis nur unu lageto, unu gravurita memorŝtono kaj tereno kun areo de 0.2 hektaro, dum nun la loko fariĝis granda parko kun areo de 20 hektaroj. Post la pordo estas cedraro kaj vasta gazono. Maldekstre estas la Flora Haveno, dekstre zigzaga ponto kaj orfiŝa lageto. La centran lokon okupas peonia ĝardeno, kiu estas parko en parko, vidindaĵo ekster vidindaĵo. La parko "Liulangvenjing" (Najtingala Kantado en Ondiĝantaj Salikoj) kun areo de 27 hektaroj antaŭe estis marĉejo plena de forĵetaĵoj. Kun "Liulangvenjing" kiel centro, la parkoj Jonggin, Kingbo kaj parko de infanoj inter-



*Delikataj silkaj sunombreloj*

ligiĝis unu kun la alia ĉe la lago. Ĉie estas helkoloraj floroj, verdaj arboj kaj herbotapiŝoj. La belvidejo "Pinghuĉiujue" (Aŭtuna Luno en Ebena Lago) antaŭe estis okupitaj kaj apartigitaj de imperiistoj per altaj muroj. Nun la muroj estas malkonstruitaj kaj la pavilonoj, florbedoj kaj kioskoj fandiĝis en unuecan tuton. Proksime de la fontano Juĉjuan oni nove starigis 200-hektaran botanikan ĝardenon por scienca esplorado, ornamado kaj ekonomia mastrumado. En loĝkvartaloj Hiaŭjinghiang, Gongŝu, Giangbin k.a. estas multaj skvaroj oportunaj por ripozado. La totala areo de parkoj de la urbo okupas 270 hektarojn, kiu estas 5-oble pli granda ol tiu antaŭ la Liberiĝo.

Hangĝoŭ estas tre antikva urbo kun historio de 2,100 jaroj, kaj havas multajn antikvajn konstruaĵojn. Nun bone riparitaj estas la templo Lingjin kun historio de 1,600 jaroj, la 59.89-metra okangula pagodo Liuhe kun 13 etaĝoj el ligno kaj brikoj k.a. Ĉirkaŭ la Okcidenta Lago sanatorioj, ripozejoj kaj hoteloj estas konstruitaj. Hangĝoŭ fariĝis jam tre ŝatata ekskursejo por laboruloj kaj alilandanoj.

De antikveco Hangĝoŭ havas la kromnomon de "Urbo de Silkaĵoj". Sed antaŭ la Liberiĝo, la silka industrio stagnis ĉe manlaborado. Post la Liberiĝo tiu industrio progresis, kaj nun en la urbo troviĝas 18 relative grandaj silkteksejoj. La Hangĝoŭ-a Brokatteksejo tuj apud la Okcidenta Lago havis antaŭ la Liberiĝo pli ol 40 laboristojn kaj kelkajn mantiratajn teksmaŝinojn, per kiuj oni povis produkti nur nigroblankajn bildojn. Nun la fabriko havas 1,700 laboristojn kaj pli ol 330 elektrajn teksmaŝinojn kaj la specoj de produktaĵoj superis 1,000. La nova Silkaĵa kaj Prestinktura Fabriko de Hangĝoŭ jam efektivigis aŭtomatigon en kokonelbobenado, teksado, presado kaj tinkturado. La jara produktokvanto de la fabriko egalas al la totala produktokvanto de la tuta urbo en la komenca periodo post la Liberiĝo.

*Kadro kaj gelaboristoj studas kiel plialtigi la kvaliton de brokatoj.*



Ankaŭ ĝiaj silkaj sunombreloj, ventumiletoj, tondiloj, bambuplektaĵoj kaj aliaj tradiciaj metiartaĵoj estas tre famaj tra la tuta lando.


Hangĝoŭ produktas Longging-teon faman en kaj ekster la lando. En la produktaj brigadoj Longging kaj Mejgiavu, sudokcidente de la Okcidenta Lago, la montoj estas tutan jaron kovrataj de verdaj tearboj post la Liberiĝo. Komunumanoj kreis sur montodeklivoj ŝtuparkampojn, tiel ke la areo de teĝardenoj senĉese pligrandiĝas. Dank' al plibonigo de flegado de teĝardenoj la pohektara produktokvanto de teo altiĝis de 450 kg. en la komenca periodo post la Liberiĝo ĝis 2,100 kg.

Persistante ĉe la principo sinapogi sur la propraj fortoj kaj peneme lukti kontraŭ malfaciloj, la Hangĝoŭ-a popolo starigis, kun disvolvo de agrikulturo kaj silkteksado, industriojn de minado, metalurgio, maŝinoj, kemiaĵoj, plasto, elektrono, horloĝoj, medikamentoj k.a. Antaŭe, eĉ maŝinpecoj de Hangĝoŭ plejparte devis estis importitaj de aliaj lokoj aŭ de eksteraj landoj. Sed nun Hangĝoŭ jam povas produkti aŭtojn, traktorojn, riverŝipojn, generatorojn, ŝpinteksajn maŝinojn, elektronajn mezurilojn kaj diversajn ilmaŝinojn. La totala produktovaloro de Hangĝoŭ en 1972 estas 21-oblo de tiu de la komenca periodo post la Liberiĝo.


Kun progreso de la produkto, la popola vivo estas plibonigata. Nun Hangĝoŭ havas 5 superajn lernejojn, 56 mezgradajn lernejojn, 10 sintezajn kaj 6 fakajn hospitalojn. Krome, la fabrikoj, oficejoj, lernejoj, popolkomunumoj kaj loĝkvartaloj havas sian sanitarejon, kuracejon aŭ sanprotektejon.

En festoj aŭ ripoztagoj, laboruloj ofte venas kun maljunuloj kaj infanoj al la lago por rigardi la vidindejojn kaj adimiri la belan pejzaĝon.

# Hanĝoŭ—Urbo apud Lago




La pitoreska digo Suti en printempo



Sur bordo de la Okcidenta Lago






La parko Huagang



La zigzaga ponto Giukju






La Peonia Kiosko en la parko Huagang



Printempe sur la
Okcidenta Lago




La templo Lingjin

ĈANG GANG:

# la virina sporta taĉmento "MEVO"

EN Pejĝuang-brigado de Vanĵong-gubernio de Ŝanhi-provinco sin trovas Postlabora Virina Sporta Taĉmento "Mevo".

Ĉiutage, post la laboro, tuj komenciĝas sporta aktivado sur la brigada draŝejo. Iuj komunumanoj ludas pilkon, aliaj sin ekzercas per lukta arto. Aplaŭdoj kaj ĝojkrioj refreŝigis la rigardantojn. Inter tiuj ludantoj la junulinoj estas pli viglaj kaj tiras al si atenton de la spektantoj. Ili estas membroj de la taĉmento, kies blua sporta vesto surportas la okulfrape blankan vorton "Mevo".

Tiu sporta taĉmento estis organizita de Liu Kinglian, Pej Lingĝu kaj aliaj junulinoj en 1956. Sub la prizorgo de la partia filio kaj amasoj, la "mevoj" kreskas generacion post generacio, la nunaj 40 junulinoj de la taĉmento jam apartenas al la 5-a generacio de "mevoj", inter kiuj multaj havas la saman aĝon kun tiu de la taĉmento. Ili ĉiuj estas fortikaj kaj gajaj.

Jam 17 jarojn la taĉmento persistis en postlabora korpoekzercado. En tiuj jaroj la membroj ne nur plifortigis sian korpan kvaliton, sed ankaŭ plimultigis siajn labortagojn. Pej Jinhian antaŭe suferis de ftizo, sed dank' al helpo de kuracisto kaj taŭga korpoekzercado, ŝi iom post iom resaniĝis. Pro tio ŝiaj gepatroj ĝoje kuraĝigis siajn aliajn du filinojn aniĝi al la taĉmento. La "Mevo" ofte konkursas kun fratinaj teamoj por lerni unu de alia, kaj hodiaŭ jam fariĝis unu el la fortaj virinaj korbopilkaj teamoj en la gubernio.


La "Mevo" ankaŭ estas ĉefa forto de Pejĝuang-brigado en la amasa sporta aktivado. Kiam komunumanoj faras disaŭdigan gimnastikon, ili funkcias kiel kondukantoj; kiam gemaljunuloj volas lerni sanigan gimnastikon *Tajĝiĉjuan*, ili servas kiel instruantoj; kiam komunumanoj ludas korbopilkon, ili faras por ili prezentadon kaj direktas ilin samtempe en ilia ludo. Inspirate de la taĉmento "Mevo", amasa sporta aktivado disvolviĝas en Pejĝuang-brigado kaj nun 60% el la komunumanoj persistas en tutjara korpoekzercado.

La "Mevo" ankaŭ disŝutas siajn semojn ekster la brigado. Iuj membroj de la teamo edziniĝintaj al aliaj vilaĝoj portas al la vilaĝo de sia edzo sperton pri disvolvo de sporta aktivado kaj tie organizis novan virinan sportan taĉmenton. Liu Jin-gju edziniĝinta al Fengĝang-brigado de Guanghua-komunumo, nelonge post sia alveno, ŝi tie organizis la Postlaboran Virinan Sportan Taĉmenton "Aŭroro". Iun festtagon de la pasinta jaro, ambaŭ taĉmentoj faris amikan konkurson de korbopilko. Komunumanoj de Pejĝuang-brigado diris ĝoje: "Unu mevo forflugis, tamen ŝi elkulturis amason da 'mevoj'."

La membroj de "Mevo" estas ne nur avanuloj en sporta aktivado, sed ankaŭ sturmantoj en agrikultura produktado. Kun bona sano ili ĉiujare laboris meznombre pli ol 300 tagojn kaj ludas ĉiam pli grandan rolon en la konstruado de socialisma kamparo.

En 1972 la brigado konstruis akvorezervejon en batalo kontraŭ sekegeco. En tiu laboro, la "mevoj" estis sturmantoj. Dum ripozo ili kantis kaj faris gimnastikon, kio alportis pli da ĝojo al la konstruantoj. Por firmigi la bazon kaj bordojn, oni bezonis grandan kvanton da argilo. La junulinoj meminiciate prenis por si la taskon por fosi kaj transporti argilon. Por laŭdi ilian brilan kontribuon en la konstruado, la komunumanoj nomis la akvorezervejon "Mevo".

*Ekzerco en pilka ludo*



# Esploro pri Kadavro de Okcidenta Han-dinastio

EN printempo de 1972, la tombo n-ro 1 ĉe Mavangduj de Okcidenta Han-dinastio estis malkovrita en la orienta antaŭurbo de Ĉangŝa de Hunan-provinco de nia lando. Pri tio ni jam raportis en la artikolo "Pli-ol-2000-jara Antikva Tombo Ĵus Malkovrita" de n-ro 9, 1972, *El Popola Ĉinio*. La granda kvanto da historiaj restaĵoj el tiu antikva tombo estas tre valora materialo por studi la historion, ekonomion kaj kulturon de la antikva Ĉinio. Precipe la post 2,100 jaroj bone konservita virina kadavro el la tombo estas valora objekto por scienca esploro.

Nia registaro donis sufiĉe grandan zorgon pri la scienca esploro pri tiu kadavro. Sinteza scienca esplorado pri ĝi estas farita de specialistoj pri arkeologio, anatomio, histologio, patologio kaj biokemio de la Hunan-a Medicina Instituto kaj aliaj lokoj sub la gvido de la kompartia komitato de Hunan-provinco.

Nun la sciencistoj jam faris la unuan paŝon en sia esplorado kaj akiris nombron da fruktoj. Ili jam povas diri al ni pri la konservostato de la kadavro, la malsanoj suferitaj de la mortinto kaj la kaŭzo de ŝia morto. Ili ankaŭ faris unuapaŝan difinon pri la metodo uzita en la antikva Ĉinio por konservi kadavron.

Pri tiu kadavro la Pekina Studio de Scienc-eduKaj Filmoj faris la koloran filmon *Studo pri Kadavro 2100-jara.*

La filmo registris laŭ la procedo de la esplorado la aspekton kaj sekcadon de la kadavro.

Historiistoj jam konstatis, ke la mortinto estis familiano de Dajhoŭ en la komenca periodo de Okcidenta Han-dinastio. Kiam la virina kadavro estis elterigita, ĝi estis kompleta kaj malseketa, kun longeco de 154 centimetroj kaj pezo de 34.3 kilogramoj. Ĝiaj membroartikoj estis moveblaj. En la filmo oni povas vidi, ke la molaj histoj de multaj partoj de la virina kadavro estas ankoraŭ elastaj kaj ŝiaj haroj ne defalas je malforta tiro. Sur ŝia dekstra palpebro ankoraŭ troviĝas kelkaj okulharoj. La timpana membrano de ŝia dekstra orelo restas sendifekta. Ankoraŭ klare videblaj estas la poroj en peco da haŭto de la ekstera flanko de ŝia dekstra femuro. Sur unu el ŝiaj fingroj troviĝas nigrebruna ungo. La sulketoj sur la piedfingroj estas tre klaraj. La haŭto de ŝia dorso estas sen kuŝado-absceso aŭ alia difekto. Per X-radia ekzameno oni konstatis, ke ankaŭ la ostaj artikoj de ŝiaj etfingroj restas bone konservitaj.

La duramatro de la antikva kadavro restas sendifekta, tamen la cerbo diseriĝas kaj okupas nur trionon de la krania kesto. En la cerbo nenia granda bulo de koagulita sango estas trovita. La histotavoloj de la abdomena muro estas klare distingeblaj. La organoj en la brustokesto kaj abdomena kavo troviĝas en la normalaj lokoj kaj iliaj formoj estas fundamente bone konservitaj. Ankaŭ la diafragmo restas sendifekta. La muroj de la stomako kaj intestoj jam maldikiĝis kiel papero. La hepato kaj pulmoj evidente malgrandiĝis. La mola histo post la abdomena membrano estas ankoraŭ relative elasta, la membranoj interne de la koro kaj tiuj de ĝiaj valvoj estas glataj kaj kompletaj, kaj la proporcio inter la koraj kavoj estas fundamente normala.

La filmo montras al la rigardantoj serion da raraj ekzempleroj de antikvulaj organoj. La miraklo farita de la antikva ĉina laboranta popolo en konservo de kadavro refoje pruvis, ke la historio estas kreita de la laboranta popolo.

Ankaŭ tiaj delikataj partoj kiaj brusta dukto kaj pulma nervaro en la kadavro estas bone konservitaj. Du sangbuloj troviĝas en la malgranda vejno apud la utero.

En ŝiaj ezofago, stomako kaj intestoj sciencistoj trovis 138.5 melonajn semojn.

Dum esplorado de histaj detranĉaĵoj per elektrona mikroskopo, oni trovis ke la delikata strukturo de multaj partoj de la antikva kadavro ankoraŭ restas bone konservitaj. Kaj oni trovis restantajn kartilagajn ĉelojn kaj grasograjnetojn en kartilaga histo.

Post multaj eksperimentoj sciencistoj konstatis, ke la sango de la mortinto apartenas al A-grupo.

Sciencistoj ankaŭ faras analizon pri la likvaĵo en kiu trempiĝis la kadavro kaj faris studon pri la sepultilaro kaj strukturo de la tombokavo. Ili opinias, ke la kadavro bone konserviĝis pro diversaj kaŭzoj kaj la ĉefaj inter ili estas la hermeteco, manko de oksigeno kaj profundeco de la tombokavo. Kemia analizo montras, ke la likvaĵo en la ĉerko estas acida kaj povas iom malhelpi la kreskadon de bakterioj. La interna ĉerko konsistas el ses integraj lignaj tabuloj lakitaj ambaŭflanke. Ankaŭ la meza ĉerko estis farita el grandaj integraj tabuloj strikte kunigitaj. En la komenca periodo la putrado de la kadavro tute envolvita forkonsumis la plejparton de la oksigeno en la ĉerko kaj tio multe malrapidigis la procedon de putrado. La kadavro estis metita en kvar ĉerkoj lokitaj unu en alia kun tre malgranda interspaco. La kovriloj de la ĉerkoj estis sigelitaj per lako, ekster la ĉerkoj estis du ĉerkujoj unu en la alia, ĉirkaŭ, sur kaj sub la ekstera ĉerkujo metiĝis pli ol 5 tunoj da ligna karbo kaj kompakta blankargila tavolo kun dikeco de pli ol unu metro. Kaj tiu tombokonstruaĵo troviĝis en kavo 20.5 metrojn profunda. Ĉiuj tiuj kondiĉoj favoras al longa konservado de la kadavro.

La zorgaj aranĝoj en tiu Han-dinastia tombo por konservi la kadavron plene montras, ke la antikva laboranta popolo de Ĉinio estis riĉa je saĝo kaj talento, kaj tamen kiom da riĉaĵoj forrabis de ĝi tiu nobelo kun nur 700 familioj sub sia regado! La familianoj de la nobelo vivis lukse kaj diboĉe, kaj kiom da sango kaj ŝvito de laboruloj ili konsumis eĉ por enterigo!

Kvankam tiu nobelino multe zorgis pri siaj nutraĵoj, tamen la luksa vivo faris ŝin tiel malsanema, ke ŝi mortis je la aĝo de nur ĉirkaŭ 50 jaroj. Sciencistoj trovis, ke ŝi suferis de multaj malsanoj dum sia vivo kiel ellokiĝo de lumba intervertebra disko, ostorompiĝo de la dekstra antaŭbrako, tuberkulozo kaj skistosomozo. Kaj el ŝiaj malsanoj la plej seriozaj estis kolelitiazo, ĝenerala ateromosklerozo kaj koronaria kormalsano. Laŭ analizo de la specialistoj, ŝi mortis eble pro tio, ke la gala koliko kaŭzis la koronarian kormalsanon kaj seriozan senritmiĝon de la koro. Ankaŭ la eltombigitaj kuracherboj pruvis, ke la mortinto certe suferis de koronaria kormalsano.

Surbaze de la unuapaŝa esplorado, ĉinaj sciencistoj elmetis novajn studobjektojn pri la antikva kadavro kaj estas daŭrigantaj la esploradon.




# Helpo al Samklasano

HIAŬ Hongjong estas lernanto de la unuajara klaso de Hiangtang-a Mezlernejo de Nanĉang-gubernio, Gianghi-provinco. Li ne vizitis la lernejon dum pli ol duonjaro pro falvundiĝo. Sed li bonege sukcesis en ĉiuj ekzamenoj. Parolante pri tio, ĉiuj lernantoj laŭdas lernantinon Vu Ŝulan kiu entuziasme helpis Hiaŭ Hongjong lerni la lecionojn donitajn dum lia foresto.

En oktobro de la pasinta jaro, Hiaŭ Hongjong enhospitaliĝis pro la falvundiĝo. Post monato li revenis al la hejmo, sed li ankoraŭ devis ripozi kaj ne povis viziti la lernejon. Tiam Vu Ŝulan, lia samklasa lernantino, meminiciate helpis lin lerni la lecionojn.

Ĉiutage Vu Ŝulan iris al lia hejmo je 1 kilometro malproksime de sia hejmo por helpi lin. En la komenco, Hiaŭ timis, ke li ne povos atingi la nivelon de siaj samklasanoj malgraŭ ŝia helpo. Vu kuraĝigis lin: "Lernu diligente, kaj vi certe sukcesos." Sub ŝia helpado Hiaŭ plifortigis sian memfidon kaj diligente lernis en la hejmo.

Por pli bone helpi Hiaŭ, Vu mem lernis pli diligente sub la helpado de instruistoj. Ŝi unue mem bone lernis la lecionojn, kiujn ŝi devis helpi lin lerni.

Iun tagon de la pasinta vintro, kiel kutime, Vu Ŝulan venis al la hejmo de Hiaŭ Hongjong malgraŭ neĝblovado. Vu ne povis solvi unu aritmetikan problemon prezentitan de Hiaŭ. Ŝi demandis aliajn lernantojn, tamen ankaŭ ili ne povis ĝin solvi. Ĝuste tiam la aritmetika instruisto venis. Ŝi ĝoje diris: "Bonege! Instruisto bonvolu helpi Hiaŭ Hongjong lerni tiun ĉi lecionon."

Fininte la lecionon, la instruisto laŭdis Vu Ŝulan pro ŝia helpemo.

Ĉiutage Vu Ŝulan persiste helpis Hiaŭ Hongjong malgraŭ vento kaj pluvo. En aprilo de la kuranta jaro, li resaniĝis kaj komencis viziti la lernejon kune kun la samklasanoj, kaj gajnis bonajn sukcesojn.

*Inter Amikoj*

# Vivu la Amikeco inter Ĉinio kaj Japanio

de HIE BINGHIN


EN belaj printempaj tagoj, kiam plene floris sakuroj de Japanio, la delegacio de la Ĉina-Japana Amikeca Asocio kun Liaŭ Ĉenggi kiel estro faris, de la 16-a de aprilo ĝis la 18-a de majo, vizitadon al nia najbaro Japanio, kiu havas amikan interrilaton de 2,000 jaroj kun Ĉinio. La ĝojaj 33 tagoj kiujn ni pasigis en varma amikeco de la japana popolo gravuriĝis en la koro de niaj 55 membroj de la delegacio.

Nia delegacio estas la unua granda amika delegacio al Japanio post la normaliĝo de la diplomatiaj rilatoj inter Ĉinio kaj Japanio. La komplezo de la japana popolo torentis al ni kiel akvo el malfermita kluzo. Invitaj leteroj kaj telegramoj el diversaj lokoj de Japanio flugis al ni kvazaŭ neĝflokoj. En granda ĝojo kaj dankemo ni devis dividi la delegacion en 4 grupojn, kiuj vizitis respektive Tokion, Hokkaidon, Kioton, Osakan kaj 34 el 43 gubernioj. Ni havis ne malpli ol 500 fojojn da vizitoj, intervidiĝoj, kunsidoj kaj kunvenoj. Ni kontaktiĝis kun dekmiloj da laboristoj, kamparanoj, fiŝistoj, junuloj, virinoj kaj personoj de rondoj kulturaj, artaj, sciencaj, edukaj, ĵurnalismaj, sportaj, religiaj, politikaj kaj ekonomiaj. Krome, en fervojaj stacioj, apud ŝoseoj kaj ambaŭflanke de stratoj, multaj homoj svingadis flagojn kaj hurais al ni. La tutlanda bonveniga komitato, kiu akceptis nin, konsistis el 22 partioj, societoj kaj personoj kaj nombris preskaŭ 3,000 membrojn. La lokaj bonvenigaj komitatoj preskaŭ ĉiuj estis konsistigitaj el personoj de diversaj rondoj kaj el guberniestroj, urbestroj aŭ prezidantoj de guberniaj aŭ urbaj parlamentoj. Tiaj akceptoj en la diversaj lokoj de Japanio pruvis, ke la amikeco inter Ĉinio kaj Japanio fontas malproksime kaj fluas longe. Ni rikoltis la abundajn fruktojn kulturitajn de niaj praavoj kaj devas dissemi pli multe da novaj amikaj semoj en la fekundan amikecan teron.

La versaĵo donacita de japanaj virinaj rondoj al ni diras: "Sakuraj floroj estas floroj de Japanio kaj ankaŭ floroj de la popolo." Jes, ni ja rigardas sakuron kiel simbolon de la amikeco inter Ĉinio kaj Japanio. La sakuraj arbetoj donacitaj de Japanio al Ĉinio post la stariĝo de la diplomatiaj rilatoj inter ambaŭ landoj, nun bone kreskas sur la tero de Pekino. En la tekunveno, dum kiu la japana ĉefministro Tanaka Kakuej akceptis la



*Vizito al iu familio en Adaĉi-kvartalo de Tokio.*



*Hie Binghin manpremas kun Ĉefministro Tanaka Kakuej ĉe sakur-kunveno.*

tutan delegacion, la delegacia estro Liaŭ Ĉengĝi metis donace en la manon de la ĉefministro tri junajn foliojn, kiuj estis plukitaj de sur sakuraj arbetoj kreskantaj en Pekino. Tiam en la halo de la ĉefministra domo eksplodis ĝoja aklamado.

Ĝuste en florado de sakuro ni venis al Japanio kaj ĉie aprezis pompajn sakurajn florojn simbolantajn la amikecon inter Ĉinio kaj Japanio. Unue en la Imperiestra Ĝardeno de Ŝinĝiku en Tokio ni estis invitita al la sakurkunveno okazigita de Ĉefministro Tanaka Kakuej. La amikoj de Ĉinio kaj Japanio promenadis manon en mano sub la sakuraj arboj kun ruĝetaj aŭ neĝblankaj floroj. En la melodio de la baleto *Blankhara Knabino* bolis entuziasmo en nia koro. Post tio, ni vizitis multajn aliajn lokojn kaj ofte vidis sakurojn kaj ĉiuj membroj de nia delegacio lernis la japanan popolan kanton *Sakuro, Sakuro.* Kiam ni vizitis la nordon de Japanio, ni vidis ankaŭ en Hokkaido sakurojn plej malfrue florantajn.

Nia delegacio estis dividita en 4 partojn, tial multajn neforgeseblajn varmajn scenojn mi ne persone spertis. Tamen, vojaĝante de Osaka ĝis Okinava, ni jam vidis nenombreblajn buntajn scenojn.

La 2-an de majo, ni veturis de Osaka al Jamaguĉi. Sur la vojo preter Hiroŝima kaj aliaj stacioj ni ne elvagoniĝis, sed ĉie surkaje multaj japanaj amikoj svingadis flagojn, hurais, manpremis kun ni ekster la fenestroj kaj donacis al ni bukedojn da belaj floroj. En la mallonga intervidiĝo je rapida preterpaso ni sentis senliman ĝojon kaj profundan bedaŭron. Iu verkisto envagoniĝis ĉe la stacio antaŭ Jamaguĉi kaj donacis al mi skatolon da aromaj kukaĵoj. Sur la skatolo estis paperpeceto kun jenaj vortoj: "Tio ĉi estas sakurkukaĵoj, gluecrizaj buloj pakitaj per sakuraj folioj laŭ la japana tradicio. Ili estas aromaj, bonvolu gustumi." Mi dankis lin kun granda ĝojo, malfermis la skatolon kaj frandis ilin kune kun miaj kunuloj. La bonodoraj kukaĵoj vere meritas la famon. Per tiuj kukaĵoj ni pli profunde konis la koloron, odoron kaj guston de sakuro.

La 4-an de majo, en urbo Hakata de Fukuoka, ni partoprenis en *Dontaku,* la grandioza popola dancado. Tio estas tradicia festo de Hakata. Ordinare en tiu tago, miloj kaj miloj da urbanoj kun krono kaj en koloraj vestoj elkuras sur la stratojn. Krakante per lignaj kuleroj kaj kantante pri sia deziro, ili dancas inter koloraj ĉaroj ornamitaj kiel temploj. Sed ĉijare la ĉaroj estis ornamitaj per panda modelo. Sur la kuleroj estis surskribitaj bondeziraj ruĝaj vortoj "Amikeco inter Ĉinio kaj Japanio". Ankaŭ ni estis alivestitaj de niaj gastigantoj same kiel ili mem. Ni iris en la gajajn homfluojn, kantis, dancis kaj aklamadis kune kun ili: "Vivu la amikeco inter Ĉinio kaj Japanio!"


En Nagasaki, antaŭ ĉeesto de grandioza bonveniga vina bankedo ni spektis drakdancon aranĝitan speciale por ni. Japanaj amikoj diris al ni, ke la drakdanco enkondukiĝis en Nagasaki de Ĉinio en antikveco, tial la vestoj, gongoj kaj tamburoj ĉiuj estas ĉinstilaj. Aparte interesa estis tio, ke krom granda drako dancis ankaŭ malgranda drako, kiu saltadis sekvante la grandan. Ĉiuj ludantoj estis knaboj kun aĝo de malpli ol 10 jaroj kaj la lasta subtenanta la drakan voston estis infano nur 3-jara en koloraj vestoj. Subtenate de plenaĝulo je la brakoj la infano flugrapide kuris cirklon post la aliaj en la brua gongado, tamburado kaj krakado de petardoj kaj rikoltis ridegon kaj tondran aklamadon ĉe la rigardantoj. Tio ke gastamaj gastigantoj bonvenigis la ĉinajn amikojn per tiu ĉi ludo, montris, ke Nagasaki kaj Ĉinio havas amikajn interrilatojn de longa historio.

La lasta urbo vizitita dum nia vojaĝo estas Naha de Okinava. En la bonveniga vina bankedo ni refoje spektis *No*-prezentadon (japana klasika simbolisma dramo konsistanta el kanto, danco kaj muziko). La enhavo de *No*-prezentado estis ĉina antikva mito pri la Bovpaŝtisto kaj Teksistino. La ĉarma muziko, la elegantaj vestoj kaj la agrabla melodio . . . ĉio tio estas rara en *No*-prezentado. Plejparto de la aktoroj estis knabinoj. Ilia dolĉa rideto kaj ĉarmaj okuloj nun ankoraŭ viglas en mia memoro.

Japanaj amikoj diris al mi, ke *No*-prezentado de Okinava estas heredita de Rjukju de antikveco por bonvenigi senditojn de Tang-dinastio. Tio rememorigis al mi la Ŝtatan Muzeon de Tokio, la Belartan Ekspozejon de Taokugava en Kioto, la Isotejen-an Muzeon de Antikvajoj en Kagoŝima kaj la Gubernian Muzeon de Naha. . . Pririgardante tie la historiajn restaĵojn kaj artaĵojn, mi ĉiam sentis profunde, ke la kantoj, dancoj, kaligrafaĵoj, pentraĵoj, brodaĵoj, lakitaĵoj, porcelanaĵoj. . . ĉiuj estas kristalo de kulturaj interŝanĝoj de Ĉinio kaj Japanio dum 2,000 jaroj, estas abundaj fruktoj de la grandaj laborantaj popoloj de ambaŭ landoj, post interŝanĝo kaj reciprokaj lerno, perfektigo, polurado kaj pliriĉigo en kulturo sur la bazo de tradicia kulturo. Kiel disvolvi la atingojn de niaj praavoj kaj kontribui al la kulturo de la tuta mondo, tio postulas strebadon de ni kaj nia idaro.

Jen kial mi diris, ke la amikeco inter Ĉinio kaj Japanio fontas malproksime kaj fluas longe. Kun granda ĝojo mi vidis, ke popola amika interrilato kaj kultura interŝanĝo estas daŭrigata de nia juna generacio kaj estos daŭrigata de generacio al generacio. Nun la junuloj de Ĉinio kaj Japanio frekventas unuj la aliajn en la najbaraj landoj apartigitaj nur de strio de akvo, kaj mi ĉiutage legas en ĵurnaloj kaj vidas en televido, kiel ili laboras kaj aktivas en la du landoj. Ĉu per amikaj vizitoj aŭ sportaj konkursoj, ĉu per artaj kaj sciencaj ekspozicioj aŭ muzikaj kaj dancaj prezentadoj, ili entuziasme kaj senlace laboras por la eterna amikeco inter Ĉinio kaj Japanio.

En ĉifoja vizitado mi renkontiĝis refoje kun nemalmultaj japanaj geamikoj, kiuj pene laboradis kaj faris grandan kontribuon por akceli la amikecon kaj efektivigi normaliĝon de la diplomatiaj rilatoj inter Ĉinio kaj Japanio. Hodiaŭ, rememorante la pasintecon, ni sentas ĝojon kaj dankon nepriskribeblajn per vortoj pro la efektiviĝo de la longtempa deziro de la popoloj de ambaŭ landoj. Rigardante la estontecon, ni eksentis ankoraŭ pli profunde ke la "daŭrigantoj havas taskon pezan kaj vojon longan". Miaj japanaj malnovaj amikoj nun diligente laboras por ke la japanaj junuloj plifirmigu la amikecon inter Japanio kaj Ĉinio. Ankaŭ mi faros en miaj lastaj jaroj aktivan kontribuon kune kun niaj junuloj por tia amikeco.



*Inter geamikoj de la Kiota Universitato*

# Kultura kaj Amikeca Aktivado



## La 500-a Datreveno de la Naskiĝo de Koperniko

En junio de 1973, la Ĉina-Pola Amikeca Asocio, la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj kaj la Pekina Planetario kune aranĝis en Pekino bildan ekspozicion okaze de la 500-a datreveno de la naskiĝo de la pola astronomo Koperniko.

*La pollanda ambasadoro al Ĉinio Stachowiak, vicestro de la Ĉina Akademio de Sciencoj Vu Joŭhjun kaj vicprezidanto de la Ĉina Popola Amikeca Asocio kun Fremdaj Landoj Jang Gi elpaŝas el la ekspoziciejo post rigardado.*




La heliocentra teorio kreita de la granda astronomo Koperniko demonstris la rivoluon de la terglobo kaj aliaj planedoj ĉirkaŭ la suno, pruvis geocentran teorion tute erara, tiel ke emancipiĝis la naturaj sciencoj sufokitaj de ideisma mondkoncepto dum pli ol mil jaroj.

La Ĉina Akademio de Sciencoj kaj la Ĉina Astronomia Societo okazigis en Pekino kunsidon memore al la 500-a datreveno de la naskiĝo de Koperniko. Vicestro de la akademio Vu Joŭhjun malfermis la kunsidon dirante ke la ĉinaj sciencistoj havas altan respekton al Koperniko pro liaj brilaj kontribuoj al la progreso de sciencoj. Li daŭre diris, ke lerno de la historio de la batalado de Koperniko kaj liaj daŭrigantoj por la vero de scienco havas gravan signifon por ni en propagando de sciencoj kaj materiismo en la batalo kontraŭ superstiĉo kaj ideismo. Li esprimis respekton al la pola popolo kaj deziris senĉesan kreskon de la amikeco inter la ĉina kaj pola popoloj.

Ĝang Juĝe, prezidanto de la Ĉina Astronomia Societo kaj aliaj ĉinaj astronomoj faris ĉe la kunsido paroladojn kun la titoloj *Granda Revolucio en Astronomio*, *Heliocentra Teorio en Ĉinio*, *La Metodo de Konado de Koperniko kaj Lia Revolucia Spirito* kaj *Koperniko kaj la Moderna Astronomio.*

La pollanda ambasadoro al Ĉinio Stachowiak faris paroladon ĉe la kunsido. Li esprimis dankon al la ĉinaj sciencistoj pro ilia memoriga aktivado pri Koperniko kaj ankaŭ kredon, ke tiu aktivado plie akcelos la disvolviĝon de la amikeco inter la pola kaj ĉina popoloj.

## Lerni la Han-an Lingvon kun Plena Amikeco

En Bukaresto, la ĉefurbo de Rumanio, ekde aŭtuno de 1971, du elementaj lernejoj malfermis han-lingvan kurson. En la 75-a elementa lernejo de Bukaresto 200 lernantoj de 6 grupoj diligente lernas

la hanan lingvon. En duonjaro lernantoj de la unua klaso jam ellernis ĉ. cent frazojn kaj post unu kaj duono da jaroj ili jam povas skribi centojn da ideografiaĵoj de la hana lingvo. Direktoro de la lernejo Mazilu diris al la vizitantaj ĉinaj gastoj: "Ni semas ne nur lingvajn sciojn, sed ankaŭ amikecon. Ni volas kulturi en ili en la knabeco amikan senton al la ĉina popolo."

En la postlabora Popola Universitato fondiĝis ekde la jaro 1971 du grupoj de la hana lingvo kun pli ol 50 lernantoj. Inter tiuj estas oficistoj, inĝenieroj, kuracistoj, ordinaraj laboristoj, junuloj kaj dommastrinoj, kaj la plej maljuna aĝas 66 jarojn. 50-jara laboristo Silian skribas hanajn ideografiaĵojn tiel bone, ke oni ne kredas ke li estas lernanto de postlabora universitato. Je la fino de la unua lernojaro, Silian skribis sur la nigra tabulo frazon: "Por firmigi la amikecon inter la rumana kaj ĉina popoloj, ni nepre bone lernos la hanan lingvon." La frazo montris deziron de la tuta grupo.

Ekde 1958, la fakultato de la hana lingvo de la Bukaresta Universitato de Rumanio jam kulturis multe da studentoj. Inter tiuj estis Ana, kiu nun estas instruistino de la hana lingvo en la 75-a elementa lernejo de Bukaresto. Kune kun siaj kolegoj ŝi kreis kaj aplikis novan instruan metodon konvenan por rumanaj geknaboj, tiel ke la infanoj multe progresis en lernado de la hana lingvo. Hodiaŭ, rumanoj kiuj lernas la hanan lingvon ligas sian lernadon kun plifirmigo de la amikeco inter la rumana kaj ĉina popoloj. Tio montras, ke senĉese progresas la amikeco inter ambaŭ popoloj.

## Amikaj Aktivadoj de Ĉinaj kaj Japanaj Geknaboj

Post la normaliĝo de la rilatoj inter Ĉinio kaj Japanio, amikaj aktivadoj inter la ĉinaj kaj japanaj geknaboj disvolviĝas pli vaste kaj pli profunde.

Ekde 1972, sportistoj-geknaboj de tabloteniso, futbalo, naĝado k.a. de ambaŭ landoj faris reciprokajn vizitadojn kaj konkursojn. Tiuj amikaj aktivadoj ebligis al la ĉinaj kaj japanaj geknaboj havi la ŝancon lerni unu de la alia kaj pliigis la interkomprenon kaj amikecon.

Pli kaj pli multaj geknaboj de Ĉinio kaj Japanio partoprenis en la amikaj aktivadoj de interŝanĝo de



*Ĉinaj kaj Japanaj tablotenisaj sportistinoj*

kaligrafiaĵoj, pentraĵoj, manlaboraĵoj k.s. Lernantoj de la elementa lernejo Itajado de la urbo Kobe de Japanio petis japanojn vizitontajn Ĉinion transdoni 40 pentraĵojn kaj kelke da leteroj al la lernantoj de la elementa lernejo Venhinggie de Pekino. La ĉinaj lernantoj responde donacis al la japanaj amiketoj siajn pentraĵojn kaj papertondaĵojn. La instanco de Kobe ekspoziciis en la Municipa Halo tiujn donacojn, kiuj estis tre ŝatataj de urbanoj kaj precipe geknaboj. En la komenco de la kuranta jaro, Komacu de Iŝikava aranĝis kaligrafian ekspozicion de lernantoj de elementaj kaj mezaj lernejoj kun japana-ĉina amika rilato kiel la ĉefa enhavo. La japanaj geknaboj sendis premiitajn kaligrafiaĵojn al la ĉinaj amikoj. Unuaklasa lernanto de mezlernejo skribis leteron al ĉinaj geknaboj, en kiu li diris: "Ni deziras kontribui forton en pliigo de la amikeco inter Japanio kaj Ĉinio. Post multa ekzercado ni skribis tiujn ideografiaĵojn."

En la lasta marto, pere de Radio Pekino, lernantoj de la elementa lernejo Venhinggie rakontis al la geknaboj de Hiogo de Japanio pri sia lernado kaj vivo kaj esprimis, ke ili klopodos por plie profundigi la amikecon inter la geknaboj de ambaŭ landoj. En la ceremonio de semestra komenco en aprilo ĉijare, 24 elementaj lernejoj de Hiogo redonis la registritajn parolojn de la Radio Pekino. Tio vekis fortan eĥon inter la lernantoj kaj profundigis la amikecon inter la ĉinaj kaj japanaj geknaboj.

Lernantoj de la elementa lernejo Zandong de Pekino kaj la elementa lernejo Macuŝiro de Hokkaido de Japanio fariĝis intimaj amikoj pere de sakurarboj. En aprilo ĉijare, lernantoj de la elementa lernejo Macuŝiro refoje donacis al la lernejo Zandong 40 sakurarbidojn, kiujn ili zorge kulturis. Ĉinaj geknaboj plantis la arbidojn en Tiantan-parkon de Pekino kaj ofte iris tien akvumi kaj buti. En la Internacia Laborula Festo de la 1-a de majo, la elementa lernejo Zandong eldonis murgazeton kun titolo "Sakuro — Amikeco" por laŭdi, ke la amikeco inter la ĉina kaj japana popoloj sane kreskas kiel la sakurarboj.

# Heroaj Batalaj Kantoj

de **HINGE**

FORPASIS jam 6 jaroj de kiam Izraelo lanĉis la agresan militon kontraŭ arabaj landoj je la 5-a de junio en 1967.

En tiu periodo, alte tenante la flagon de armita batalo, la heroa palestina popolo faris valoregan kontribuon al la batalo de la arabaj popoloj kontraŭ la agreso de la izraela cionismo, marŝante antaŭen unuj post aliaj, sentime al vivofero. La palestinaj gerilanoj, bonaj gefiloj de la palestina popolo, travivis severajn provojn kaj hardadon en tiuj militaj jaroj. Sennombraj palestinaj gerilanoj skribis per sia sango sur la batalkampoj epopeojn pri sia decido batali ĝis la fino en defendo de la naciaj rajtoj.

## BATI LA AGRESANTOJN

En la pasintaj kelkaj jaroj la palestinaj gerilanoj trabatis obstaklojn unu post alia kaj senĉese lanĉis atakojn kontraŭ la izraelaj agresantoj. Dum la periodo de junio de 1972 ĝis la fino de majo de 1973, la palestinaj gerilanoj faris pli ol 500 atakojn kontraŭ la izraelaj agresantoj en Golan-altaĵoj, la okcidenta bordo de Jordano, Gaza-zono, Sinaiduoninsulo kaj aliaj areoj okupataj de Izraelo. Ili ofte kaŭzis grandajn perdojn al la izraelaj agresantoj per ofta trarompo de izraelaj elektrizitaj pikdrataj retoj, min-kampoj kaj elektronaj defendaj linioj, atakoj kontraŭ malamikaj militaj bazoj kaj postenoj, embuskoj al izraelaj patroloj kaj militaj veturiloj, minado de malamikaj militaj tenejoj, municiejoj kaj ole-tenejoj, kaj detruo de fervojoj, pontoj kaj komunikaj linioj. En Gaza-zono sola, palestinaj gerilanoj en la kvara trimestro de la pasinta jaro detruis 42 izraelajn militajn veturilojn kaj ekstermis pli ol 100 izraelajn agresantojn.

En la lasta jaro, palestinaj gerilanoj intensigis siajn gerilajn aktivadojn en la koraj areoj regataj de Izraelo kaj atakis kazernojn kaj militajn instalaĵojn de la malamiko. En la 27-a kaj 28-a de februaro, 1973, palestinaj gerilanoj profunde penetris en bone gardatan antaŭurbon de Tel-Avivo, detruis per minoj 4 izraelajn militajn veturilojn kaj ekstermis 40 malamikojn. En la 7-a de majo de la kuranta jaro, ili ankaŭ faligis izraelan helikopteron, kiu ĉirkaŭflugis super Jerusalemo por protekti militan paradon de izraelaj trupoj. Palestinaj gerilanoj donis neatenditajn batojn al la izraelaj agresantaj trupoj per tiaj facilmovaj kaj flekseblaj strategio kaj taktikoj.

## MALCEDEMAJ BRAVULOJ

Inter la popolanoj en la okupata Gaza-zono vaste cirkulas multaj kortuŝaj rakontoj pri la heroa batalo de la palestinaj gerilanoj kun la subteno de la lokaj popolanoj. La heroaĵo de Ĝihad Ŝaaraŭi estas unu el la menciindaj ekzemploj.

Iunokte de aŭgusto, 1972, gerilano Ĝihad ŝteliris kun mitraleto kaj grenadoj en la urbon Gaza por plenumi rekognoskan taskon. Li estis trovita survoje de izraela patrolo. La sagaca gerilano Ĝihad grimpis sur apudan domon kaj sin kaŝis. La malamikoj tuj alsendis helpan trupon al tiu loko. Ses izraelaj soldatoj grimpis al la domo por lin kapti, sed li restis aplomba. Kiam la malamikoj alproksimiĝis, li levis sian mitraleton kaj ekstermis ilin. Tiam kugloj el ĉiuj direktoj pafiĝis al li kaj alflugis helikoptero de la malamiko kun pliaj soldatoj. Kiam la malamikoj descendis de la helikoptero, Ĝihad tuj pafis kaj ĵetis grenadojn al ili kaj mortigis 13 malamikojn. Baldaŭ vundiĝis Ĝihad je la brusto kaj kruroj. Kaj ĉiam pli multaj malamikoj sin ĵetis al li. Ĝihad batalis sentime en danĝero, kaj kiam malamikoj alproksimiĝis, li ĵetis la lastan grenadon al ili kaj mortigis kaj vundis kelkajn el ili. Fine Ĝihad heroe oferis sian vivon, tamen liaj nomo kaj heroaĵo por ĉiam restos en la koro de la palestina popolo. Hodiaŭ, inter la palestinaj popolanoj en Gaza-zono ankoraŭ cirkulas

*Palestinaj gerilanoj*



*Ekzerco pri celado*



liaj lastaj vortoj: "Mi estas fidela filo de Palestino kaj mi mortos por Palestino."

## HEROA FAMILIO

Por subfosi la batalon de la palestina kaj aliaj arabaj popoloj, la izraelaj agresantoj foje kaj refoje entrudiĝis en Libanon kaj Sirion por ataki palestinajn gerilanojn kaj barakojn de rifuĝintoj. Ili intencas unuflanke buĉi kaj timigi la popolojn de Palestino kaj tiuj landoj kaj aliflanke semi malkonkordon inter la popoloj de tiuj landoj kaj la popolo de Palestino. Sed kunagante kun la popoloj de Sirio kaj Libano, la milicanoj kaj gerilanoj de Palestino foje kaj refoje rebatis la agreson kaj venkis la intrigon de la malamiko.

En frua mateno de la 21-a de marto, 1973, la izraelaj agresantoj lanĉis grandskalan atakon kontraŭ la barakoj de palestinaj rifuĝintoj de Badaŭi kaj Nahr Albared en Norda Libano. La 350 izraelaj agresantoj venis per helikopteroj kaj militaj ŝipoj. Libana fiŝisto nomata Maĝid Hussein estis revenanta al sia hejmo de fiŝkaptado kaj vidis ke lumsignaloj estis interŝanĝataj inter la izraelaj ŝipoj. Li rapidis al la palestinaj milicanoj kaj gerilanoj en la barakoj de rifuĝintoj kaj avertis ilin. Kiam la malamiko alvenis, la palestinaj milicanoj kaj gerilanoj, kiuj jam bone sin preparis, tuj sin ĵetis en batalon. Post intensa batalo de du horoj, ili repuŝis la agresantojn kaj mortigis kaj vundis pli ol 50 izraelajn soldatojn. Ankaŭ la malamika komandanto estis serioze vundita.

Iu 14-jara palestina knabo nomata Mohammed Fuad partoprenis en la batalo kune kun siaj gepatroj. Kiam la malamikaj trupoj alteriĝis en tiu tago, ili sin dividis en kelkajn grupojn kaj sin ĵetis al la du barakoj. Unu grupo plurfoje atakis la domon de Mohammed Fuad, kiu situas sur alta monteto superrigardanta la tutan barakon de Nahr Albared, intencante ĝin okupi. Mohammed Fuad kaj liaj gepatroj rebatis la atakojn unu post alia per pafiloj kaj grenadoj. La izraelaj agresantoj poste furioze bombardis la domon per bombĵetiloj. La trafita tegmento falis kaj la patro estis fatale vundita. La heroa Fuad transprenis la mitraleton de sia patro kaj staris fronte de la pordo por malhelpi la malamikojn trudiĝi en la domon. Lia patrino saltis el fenestro kun du grenadoj en siaj manoj kaj ĵetis ilin inter la malamikojn.

Post streĉa batalo, la malamiko retiriĝis kun siaj mortintoj kaj vunditoj. Oni trovis, ke Fuad mortis ĉe la pordo de la domo, kun la manoj firme tenantaj la mitraleton jam senkuglan. La tuta familio defendis tiun montetan pozicion per sia sango kaj la agresantoj ne sukcesis eniri en la domon de la glora familio.

LU TIAN:

# Kingdaŭ-biero




KINGDAŬ-BIERO estas fame konata en kaj ekster nia lando.

La Kingdaŭ-a Bier-fabriko sidas ĉe la piedo de la pitoreska Laŭŝan-monto kaj havas historion de 70 jaroj. Antaŭ la Liberiĝo, pro ekspluatado de imperiistoj, ĝia produktokvanto estis malgranda kaj ĝiaj laboristoj vivis mizere. Tuj antaŭ la Liberiĝo la fabriko jam funkciis nur duone. Post la Liberiĝo, la biera fabriko revenis en la manojn de la popolo kaj akiris reformon kaj plivastigon. Nun la nombro de ĝiaj laboristoj estas 6-oblo de tiu antaŭ la Liberiĝo kaj la jara produktokvanto 22-oble pligrandiĝis.

Kingdaŭ-biero estas farita el altkvalitaj floroj de lupolo, unuaranga hordeo kaj minerala fontakvo, tial ĝi havas apartan guston.

Lupolfloroj estas materialo nemankigebla en bierfarado, sed antaŭ la Liberiĝo ili tute estis importitaj. Tiam la kvalito de la importitaj lupolfloroj ne estis stabila, tial ankaŭ la kvalito de biero ne estis stabila. En la komenca periodo post la Liberiĝo, imperiistoj praktikis ekonomian blokadon kontraŭ nia lando kaj malpermesis liveradon de lupolfloroj al ĝi. Sub la gvido de la partia organizo de la fabriko, laboristoj kaj teknikistoj ekprovis kulturi lupolojn en Laŭŝan-gubernio, observante la instruon de Prezidanto Maŭ "**sinapogi sur propraj fortoj**". Laŭ la karakterizaĵoj de la klimato kaj grundo de Kingdaŭ, laŭ la leĝo de kreskado de lupolo, oni faris multfojajn provojn kaj trovis taŭgan metodon de kulturado de lupolo kaj komencis grandarean kulturadon. Tia lupolo donas abundajn florojn kun granda brakteo kaj multa poleno. Biero produktita el tia lupolfloro havas agrablan amaretan guston kaj odoras la aromon de lupola floro.

Hordeo estas ĉefa materialo en bierfarado. Por garantii la kvaliton de biero, nia ŝtato liveras al la fabriko hordeon de unuaranga kvalito. Laboristoj maltigis hordeon kaj faras bieron kristale klaran kun intensa aromo de malto.

La fontakvo de Laŭŝan-monto estas tre konforma al bierfarado. Ĝi entenas ege malmulte da malpuraĵoj. Post filtrado la akvo ludas gravan rolon en mildigo de la gusto de biero.

Por fari altkvalitan bieron, laboristoj senĉese renovigas produktan teknikon. Alkoholo kaj karbona dioksido estas nature estiĝantaj en fermentado de malalta varmo. La kvanto de la gaso en biero decidas ĝian kvaliton. Per sia sperto laboristoj faris "aŭtomatan premkontrolilon", solvis per tio la problemon de malfacila kontrolado de stabila gaspremo en la pasinteco, tiel ke la biero entenas sufiĉan gason de karbona dioksido kaj ĝia kvalito estas altigita.

# LA KOREA NACIMALPLIMULTO

de ZONGMIN

LA korea nacimalplimulto de nia lando havas pli ol 1,200,000 anojn, el kiuj la plejparto loĝas en la Janbian-a Kore-nacia Aŭtonoma Subprovinco de Gilin-provinco kaj la ceteraj loĝas en diversaj lokoj de la Nordoriento de Ĉinio.

Janbian estas loko bela kaj riĉa. La nuboskrapanta montaro Ĉangbaj kovrata de vastaj primitivaj arbaroj estas unu el la gravaj lignofontoj de nia lando. La loko multe produktas ginsengojn, cervajn junkornojn, tigrajn ostojn, ursajn galvezikojn k.a. valorajn drogojn kaj zibelajn felojn. En Janbian estas reto de riveroj kaj riĉa akvopova provizo. La grandaj kaj malgrandaj riveroj Tumen, Hajlan, Buerhatong k.a. irigacias la fekundajn kampojn. Janbian abunde produktas rizon, sojfabon, sorgon kaj aliajn agrikulturajn produktaĵojn. Ĝi estas unu el la famaj rizproduktejoj en la nordo de nia lando. Janbian havas riĉajn mineralfontojn de karbo, plumbo, kupro, oro, kalkoŝtono, oleskisto k.a. Delonge la kore-nacia popolo jam loĝis en Janbian de Ĉangbaj-montaro de nordorienta Ĉinio kaj fariĝis unu el la membroj de la granda familio de diversaj nacioj de nia lando. La popolo faras kontribuon kune kun la tieaj frataj popoloj de han-, manĉur- kaj huj-nacioj en ekspluato de la limregiono de la Patrio.

Dum la regado de King-dinastio, feŭdaj regantoj okupis la teron, kaj la koreaj laboruloj plejparte estis iliaj farmuloj aŭ dungitoj. La kruela feŭda ekspluato de farmopago kaj senpaga laboro kaj diversaj pezaj impostoj kolektitaj de la pasintaj reakciaj registaroj tiel mizerigis la kore-naciajn kamparanojn, ke ili ne havis necesajn vestojn kaj manĝaĵojn, kvankam ili pene laboradis tutan jaron. En la komenco de la 20-a jarcento, imperiistoj invadis la Nordorienton de nia lando. Ilia kruela prirabo kaj persekuto profundigis la suferon de la kore-nacia popolo.

La korea nacimalplimulto havas tradicion de revolucia batalo. La koloniisma regado de la imperiistoj kaj subpremo kaj ekspluato de la feŭdaj regantoj vekis intensan oponon de la kore-nacia popolo. Precipe ekde 1931, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, la kore-nacia popolo kaj la frataj Han-, Manĉur-nacioj fondis kontraŭjapanajn gerilajn taĉmentojn, kiuj ĉie atakis la agresantojn. En 1935, la gerilaj taĉmentoj estis organizitaj en la Kontraŭjapanan Unuigitan Armeon de la Nordoriento. En la jaroj de la Kontraŭjapana Rezistmilito, el la korea nacimalplimulto aperis multaj heroaj personoj kaj aferoj. Ekzemple, en aŭtuno de 1938, 8 kore-aj kaj han-aj partizaninoj estis ĉirkaŭitaj de malamikoj dum plenumado de

*Kore-nacia avino pretigis trinkakvon por kampadaj komandantoj kaj soldatoj de ĈPLA.*





*La Jangi-a Metiartaĵejo produktas longajn tamburojn k.a. naciajn muzikilojn por kontentigi la bezonon de la kore-naciaj popolanoj.*

tasko en Mudan-rivera regiono. Post intensa rezistado la partizaninoj uzis la lastan kuglon kaj kune saltis en la riveron. Per sia heroa ago ili skribis superban paĝon. La armitaj fortoj rezistantaj kontraŭ japanaj agresantoj bataladis en densaj arbaroj de Ĉangbaj-montaro, sagace atakis malamikojn kaj efike subtenis la rezistmiliton de la tuta lando kontraŭ la japanaj agresantoj.

Nur post la liberiĝo de parto post parto de la Nordoriento dum la periodo de 1945 ĝis 1948 la kore-a nacimalplimulto multe suferinta liberiĝis de la subpremateco kaj sklaveco. La 3-an de septembro de 1952, laŭ la politiko de la Komunista Partio de Ĉinio pri aŭtonomeco de nacimalplimulta regiono, establiĝis la Janbian-a Kore-nacia Aŭtonoma Subprovinco de Gilin-provinco. En septembro de 1958, Gilin-provinco ankoraŭ fondis Ĉangbaj-an Kore-nacian Aŭtonoman Gubernion. Sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la kore-a nacimalplimulto akiris grandajn sukcesojn en la socialismaj revolucio kaj konstruado, rapide kreskas kore-naciaj kadroj, pli kaj pli solidiĝis la unuiĝo inter la kore-a kaj aliaj nacioj, la vivo de la popolo estas senĉese plibonigata kaj ĉie videblas prospero.

Direktate de Prezidanto Maŭ, kore-naciaj kamparanoj de Janbian disvolvis la movadon de agrikultura interhelpo kaj koopero. Ĝis somero de 1956, 98% el la kamparanaj familioj partoprenis en agrikulturaj kooperativoj, tiel ke Janbian fariĝis unu el la lokoj de la lando, kiuj plej frue efektivigis agrikulturan kooperativigon. En 1958, Janbian efektivigis popolkomunumigon, kio prezentis pli vastan perspektivon por la disvolviĝo de agrikulturo.

La fama akvokonduka konstruaĵo de Gudong-rivero de Janbian ( ĝi konsistas el 8,474-metra kanalo, 1,600-metra tunelo kaj 835-metra akvedukto) estas konstruita en unu jaro post la efektivigo de popolkomunumigo kaj povas irigacii dekmilojn da muoj da kampoj ambaŭborde de Hajlan-rivero. Kore-nacia komunisto Cuj Ĝusong de Janbian estas fama tutlanda modelo en rizprodukto. Li gvidas la komunumanojn en scienca terkulturado kaj akumulis sperton de rizprodukto. Ekde 1958 lia produkta brigado kontinue tenas la meznombran pomuan produktokvanton de rizo super 350 kg. Per tio li faris kontribuon al la rizprodukto en nia Nordo kun mallonga senprujna periodo kaj malalta temperaturo. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la popoloj de diversaj nacioj de Janbian plie disvolvis la movadon lerni de Daĝaj en agrikulturo kaj ricevis bonajn rikoltojn. La meznombra pomua produktokvanto de rizo pliiĝas pli-ol-duoble ol tiu antaŭ la Liberiĝo. Ankaŭ forstokulturo, brutobredado, fiŝado kaj flankaj produktoj de Janbian multe progresis. Kompare kun tiu de la komenca periodo post la Liberiĝo, la kultura areo de ginsengoj grandiĝis ĉ. 10-oble, la cervobredado komenciĝis de nulo kaj rapide disvolviĝis, la produktokvanto de pomoj kaj piroj senĉese grandiĝas kaj tiu en plej abunda jaro atingis 10,500 tunojn.

Antaŭ la Liberiĝo troviĝis en Janbian nur kelkaj fabrikoj, kiujn imperiistoj fondis por prirabi la

popolon, kaj tute kadukiĝis ĝis la Liberiĝo. Kaj la naciaj industrioj estis subevoluintaj, ekzemple, vinfarado, olepremado k.s. Post la Liberiĝo oni rekonstruis kaj grandigis la ekzistantajn fabrikojn kaj konstruis multajn novajn fabrikojn kaj minejojn. Nun ĉiu gubernio de la subprovinco havas fer-ŝtalan fabrikon. Antaŭ la Liberiĝo Janbian ne havis silkan fabrikon. Nun la Silka Fabriko de Jangi jam komencis produktadon kaj la silkaĵoj estas tre ŝatataj de la kore-naciaj virinoj. Ĝis la fino de 1970 la tuta subprovinco jam havas 489 entreprenojn de arbohakado, minekspluatado, metalurgio, elektronoj, kemio, tekstila industrio, paperfabrikado, maŝinfabrikado, konstrua materialo, manĝaĵo, medikamento k.a. Nun la totala produktovaloro de la lokaj industrioj estas 31-oblo de tiu antaŭ la Liberiĝo. En Janbian la reto de ŝoseoj interligas ĉiujn lokojn kaj preskaŭ ĉiuj gubernioj estas atingeblaj per vagonaro.

Antaŭ la Liberiĝo la kulturo kaj edukado de Janbian estis subevoluintaj, kaj 80% el la laboruloj estis analfabetoj. Nun la subprovinco havas 3 superajn lernejojn kaj jam ĝeneraligis mezlernejan edukadon. En 1949 la urbo Jangi jam establis la Janbian-an Universitaton, el kies studentoj plejparto venis de kore-naciaj laboristaj kaj kamparanaj familioj. La korea nacimalplimulto havas sian lingvon parolan kaj skriban. La lernejoj de Janbian uzas la korean lingvon en instruado kaj lernolibrojn en la korea lingvo. La subprovinco ankaŭ eldonas ĵurnalojn, gazetojn kaj librojn kaj faras radiodisaŭdigon en la korea lingvo.

La koreoj estas tre lertaj en kantado kaj dancado. En festoj aŭ post laboro, ĉu sur stratoj aŭ ĉe kampoj, de 5-6-jaraj infanoj ĝis grizharaj maljunuloj, ĉiuj povas elegante danci laŭ taktoj de longaj tamburoj. Sub la direktado de la literatura kaj arta penso de Prezidanto Maŭ koreaj literaturistoj kaj artistoj ofte profundiĝis en la amasojn de laboristoj kaj kamparanoj, por trovi kaj reordigi riĉajn popolajn literaturon kaj arton. Ili kreis kaj reverkis la dancojn *Gaja Vilaĝo*, *Akvoportado sur Kapo*, *Longa Tamburo* k.a. La kore-naciaj dancoj havas stilon de gracieco, sugesteco, subtileco kaj lirikeco, intensajn vivospiron kaj artan efekton kaj estas tre ŝatataj de la amasoj. Post la Granda Proleta Kultura Revolucio la kore-naciaj dancoj radias ankoraŭ pli brile. Kantado en akompano de *Ĝia-je* (multkorda muzikilo) kun bela sono havas klaran nacian koloron kaj novan guston.

Sporta aktivado de la korea nacimalplimulto trovas vastan bazon inter la amasoj. En Janbian tre popularas ludo de futbalo. Ankaŭ ludo de volejbalo kaj glitado estas tre ŝatataj de la amasoj. La popola sporta aktivado estas tre vigla. Junuloj tre ŝatas *Ŝuajĝiaŭ*-luktadon kiu postulas lertecon kaj forton. Junulinoj aparte ŝatas ludon de baskulo kaj pendolo. Dank' al la vigla disvolviĝo de amasa sporta aktivado, multe altiĝis la nivelo de la sano de la popolanoj de la korea nacimalplimulto.



*La Janbian-a Kaŭĉuka Fabriko produktas kaŭĉukajn duonŝuojn ŝatatajn de la kore-naciaj virinoj kaj infanoj.*

HISTORIAJ RAKONTOJ

# Insurekcio de la Ŝanhaja Glaveta Societo

La insurekcio de la Ŝanhaja Glaveta Societo okazis sub la rekta influo de la potenca revolucia movado de la Tajping-a Ĉiela Regno. Tiam la venko de la Tajping-a Armeo en la baseno de Jangzi-rivero multe kuraĝigis la ŝanhajan popolon. En septembro de 1853, la Glaveta Societo levis gigantan armitan insurekcion.

Post la Opia Milito de la jaro 1840, Ŝanhajo fariĝis unu el la komercaj havenoj malfermitaj de King-dinastio al la okcidentaj kapitalismaj landoj. La rapide plipeziĝintaj diversaj impostoj, la ĉiam pli kruela ekspluatado de la bienuloj, la inflacio kaj velkiĝo de metiteksa entrepreno kaj velŝipa transportado ktp. kaŭzitaj de la invado de fremdlanda kapitalismo rapide dronigis en bankroton, senlaborecon kaj mizeran vivon la vastan amason de kamparanoj, metiistoj kaj maristoj de Ŝanhajo kaj ĝiaj ĉirkaŭaj gubernioj.

Por oponi kontraŭ la malluma regado de King-dinastio, la popolanoj de Ŝanhajo kaj ĝiaj ĉirkaŭaj gubernioj sin organizis en multajn sekretajn rondojn, nome Ĉiel-tera Societo, Blutuka Societo, Fugian-a Grupo, Tangkiaŭ-a Grupo, Centdraka Partio, Arahata Partio k.a. La Glaveta Societo, unu el la sekretaj rondoj, estis filio de la Ĉiel-tera Societo kaj fondita en Hiamen de Fugian-provinco, poste disvolviĝinta en Ŝanhajon. Ĝiaj membroj plejparte estis kamparanoj, metiistoj, maristoj kaj urbaj malriĉuloj kaj tenis glaveton ĉe si kiel markon. Sub la pezaj subpremado kaj pri-rabado de la fremdlandaj kapitalismaj fortoj kaj feŭdaj regantoj, tiuj sekretaj rondoj kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo pluapaŝe unuiĝis en unuecan revolucian organizon kontraŭ King-dinastio — la Ŝanhajan Glavetan Societon kun Liu Liĉuan kiel ĝia estro.

Liu Liĉuan naskiĝis en Hianŝan-gubernio (la nuna Ĝongŝan-gubernio) de Guangdong-provinco. En la jaro 1845 li aliĝis al la Ĉiel-tera Societo en Hongkong, kaj en 1849 li venis de Hongkong al Ŝanhajo kaj starigis tie la Ŝanhajan Ĉiel-teran Societon. Li faris kuracon al la amasoj kaj akiris bonan efikon. Li estis malavara kaj helpema kaj neniam postulis pagon de malriĉaj malsanuloj. Tial li ĝuis altan prestiĝon inter amasoj, kaj sub lia influo, ĉiam pli multiĝis la membroj de la Glaveta Societo.

Somere de 1849, daŭra pluvego de pli ol 50 tagoj inundis la kampojn en la regiono de Ŝanhajo, greno kaj kotono malmulte estis rikoltitaj, la prezo de rizo fluge altiĝis kaj kadavroj de malsatmortintoj troviĝis ĉie sur stratoj. Sed la lokaj registaroj de King-dinastio pli freneze superimpostis la popolanojn kaj la guberniestroj de Giading kaj Kingpu kaj aliaj eĉ devigis la kamparanojn pagi la jam nuligitajn grenimpostojn antaŭ la jaro 1850. Depost tiam sinsekve okazis la kontraŭimpostaj bataloj de kamparanoj de Ŝanhajo kaj ĝiaj ĉirkaŭaj gubernioj. Iuj kamparanoj draŝis la oficistojn, kiuj venis por urĝigi grenimposton, kaj aliaj forbruligis la ŝipojn por transporti la impostan grenon. En la jaro 1852, kamparanoj borde de Bajhe-rivero de Kingpu sturmis en la gubernian urbon, elsavis Ĝoŭ Liĉun, la gvidanton en la kontraŭ-grenimposta batalo, kaptis guberniestron Ju Longguang kaj repuŝis la atakon de la King-dinastia armeo. Tuj poste, sub la unueca gvido de la Glaveta Societo ili partoprenis en la insurekcio de Giading je la 5-a de septembro de 1853, kio estis la preludo de la insurekcio de la Ŝanhaja Glaveta Societo.

La 7-a de septembro de 1853 estis naskiĝa datreveno de Konfuceo. Matenon de tiu tago, kiam la mandarenoj kaj bienuloj de la tuta Ŝanhajo atendis en la Konfucea Templo subprovincestron Vu Gianĝang ĉeesti la ceremonion kultan al Konfuceo, 700 membroj de la Glaveta Societo el mobilizitaj soldatoj devenantaj de Guangdong-provinco, kiuj garnizonis ĉe la orienta pordego de la urbo, malfermis la urbopordon laŭ la antaŭdifinita plano, tiel ke embuskantaj insurekciaj armeanoj de la Glaveta Societo kun ruĝa tuko sur kapo sturmis en la urbon kaj rekte rapidis al la administrejo de Ŝanhajo-gubernio. Ankaŭ la Guangdong-aj rekrutoj de la administrejo partoprenis en la insurekcia armeo, mortigis la guberniestron Juan Ĝude kaj liberigis la enkarcerigitajn amasojn el malliberejo, poste parto de la insurekcia armeo rekte sturmis al la oficejo

de la subprovincestro dum alia parto al la Konfucea Templo. La insurekciaj armeanoj ensturmis en la oficejon kaj kaptis Vu Gianĝang, la estron de Suĝoŭ-Songgiang-Tajcang-subprovinco, kaj la lasta devigite donis la ofican sigelilon. Post okupo de la tuta Ŝanhajo, la insurekcia armeo proklamis starigon de la regpotenco Granda Ming-regno, kiu post nelonge alinomiĝis kiel Tajping-a Ĉiela Regno. Liu Liĉuan estis elektita kiel granda marŝalo administranta pri politiko, religio kaj ekspedicio kaj publikigis dekreton, en kiu li forte kondamnis la krimojn de King-dinastio, montris la celon de la insurekcio "ekstermi avidajn mandarenojn kaj elimini kruelaĵojn" kaj malpermesis subulojn "senpage preni ion ajn de la popolo, perforti virinojn kaj krude trakti popolanojn", kaj la malobservantoj devis esti severe punitaj. Ĉio ĉi tio ricevis varman subtenon de la popolamasoj.

Liu Liĉuan proklamis ankaŭ, ke la revolucia regpotenco sin metis sub la gvidon de la Tajping-a Ĉiela Regno kaj "observis la ordonojn de la Ĉiela Reĝo". Li ankoraŭ raportis al la Ĉiela Reĝo Hong Hiukjuan en la nomo de "marŝalo neoficiale nomita". Ankaŭ iuj generaloj de la Tajping-a Ĉiela Regno ricevis ordonon ke ili sin preparu al subteno de la ŝanhaja insurekcia armeo, tamen tio ne efektiviĝis pro la strikta blokado fare de la King-dinastia armeo.


La ŝanhajaj popolanoj varme hurais pro la venko de la armita insurekcio kaj la starigo de la revolucia regpotenco kaj aliĝis al la insurekcia armeo unuj post aliaj, tiel ke ĝi jam disvolviĝis en armeon kun dekmil personoj en kelkaj tagoj. Poste, kune kun la insurekciaj armeanoj de la Giading-a Glaveta Societo ili faris atakon respektive al la gubernioj ĉirkaŭaj de Ŝanhajo, kaj jam okupis post 7-8 tagoj la guberniajn urbojn Baŭŝan, Nanhuj, Ĉuanŝa kaj Kingpu kaj metis sub sian regadon la vastan regionon de Ŝanhajo, Giading kaj aliaj kvar gubernioj.

La venko kaj disvolviĝo de la insurekcio de la Ŝanhaja Glaveta Societo multe konsternis la regantojn de King-dinastio kaj fremdlandajn agresantojn. King-registaro ordonis, ke la estro de Giangsu-provinco Hju Najĝaŭ kaj provinca inspektoro Gierhang-a kun granda nombro da armeanoj sub sia gvido faru frenezan kontraŭatakon al la insurekcia armeo. Ĉar la insurekcia armeo neĝustatempe koncentris la fortojn de diversaj gubernioj kaj estis malforta tiel en nombro kiel en ekipaĵoj, baldaŭ la dinastia armeo okupis la guberniojn Nanhuj, Ĉuanŝa, Kingpu, Giading kaj Baŭŝan de la 22-a ĝis la 24-a de septembro. De tiam, la insurekcia armeo komencis la batalon por defendi la urbon Ŝanhajo.

Post la insurekcio, Britio, Usono kaj Francio proklamis alpreni neŭtralecon, tamen efektive ili ĉiam helpis King-registaron en subpremado al la insurekcia armeo. La usona ministro persone petis ke Liu Liĉuan transdonu la lakeon de imperiistoj Vu Gianĝang al li por gardo. Rifuzite li sendis spionon en la gardejon de Vu Gianĝang kaj lin ŝtele liberigis. Ne longe post la eskapo, Vu Gianĝang starigis reakcian regpotencon kaj gvidis reakcian trupon al freneza atakado kontraŭ la insurekcia armeo. Liu Liĉuan skribis al la usona, brita kaj franca konsuloj leteron, en kiu li juste kaj severe kondamnis la usonajn agresantojn pro ilia malamika faro kontraŭ la revolucia regpotenco. Tio esprimis la firman oponon de la insurekcia armeo kontraŭ King-dinastio kaj la fremdlandaj agresantoj.

Dum la sieĝado de Ŝanhajo, la gvidantoj de la Glaveta Societo plurfoje severe rifuzis la admonojn de dinastiaj oficistoj kaj fremdlandaj agresantoj pri kapitulaco kaj gvidis insurekciajn armeanojn en frakasado de sennombraj komunaj atakoj fare de la dinastiaj armeanoj kaj francaj agresaj trupoj. Sed la insurekcia armeo ne povis ricevi subtenon de la eksterurbaj popolanoj. Pro la blokado de la malamikoj mankis al ili greno kaj municio. En la 17-a de februaro, 1855, la insurekcia armeo konsumis la lastajn grenon kaj municion kaj sturmis el la sieĝata urbo. Krom tiuj heroe martiriĝintaj, la aliaj aliĝis al la Tajping-a Armeo por daŭre batali.

Kvankam la insurekcio de la Ŝanhaja Glaveta Societo malsukcesis, tamen ĝia 18-monata sanga batalado peze batis la regantan klason de King-dinastio kaj fremdlandajn agresantojn, kaj plene manifestis la revolucian spiriton de la ŝanhaja popolo en ilia decidema batalo kontraŭ imperiistoj kaj iliaj lakeoj.



*Armiloj de insurekciantoj*

*Sur la Kovrilo:*

Ĉinaj sciencaj laborantoj faras laseran eksperimentadon.

*Sur la Dorskovrilo:*

Printempo venas al Kunming-lago.




# EL POPOLA ĈINIO 人民中国报道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO
P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

**N-ro 9 (182) 1973**


## Ĉefa Enhavo


La Irigaciaj kaj Drenaj Sistemoj de Nia Lando ........... 1
Vizito al la Irigacia Regiono de PŜH ........................ 6
La Hodiaŭa Kjuju ........................................10
La Ĉefaj Riveroj de Ĉinio ................................13
Brilo de Naviga Signal-lanterno ..........................15
Nova Vilaĝo Linji ........................................17
Kalisterka Fabriko sur Sala Lago .........................19
Por Elimini Termitojn ....................................20
Vojaĝo de Hiaŭjun ........................................22
Hangĝoŭ — Urbo apud Lago .................................25
La Virina Sporta Taĉmento "Mevo" .........................27
Esploro pri Kadavro de Okcidenta Han-dinastio ............28
Helpo al Samklasano ......................................29
Vivu la Amikeco inter Ĉinio kaj Japanio ..................30
Heroaj Batalaj Kantoj ....................................35
Kingdaŭ-biero ............................................38
La Korea Nacimalplimulto .................................39
Insurekcio de la Ŝanhaja Glaveta Societo .................42



La artistoj de la ensemblo iras de loko al loko por fari prezentadojn.




*La Lioj Aktive Liveras Grenon al la Ŝtato* prikantas li-ajn knabinojn en elektado de plej bonkvalita greno por liveri al la ŝtato.



Muzika laboranto de la ensemblo kolektas novajn popolkantojn inter mjaŭoj.



Sur la ĉina subtropika Hajnan-insulo sin trovas la Kanta kaj Danca Ensemblo de la Hajnan-a Administracia Regiono de Guangdong-provinco varme laŭdata kaj bonvenigata de Hajnan-anoj.

Dum la pasintaj 20 jaroj depost sia fondiĝo en 1953, la ensemblo ofte profundiĝis en la kamparo kaj faris prezentadojn en la Li-a kaj Mjaŭ-a Aŭtonoma Subprovinco en Hajnan. Ili modeste lernis de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj fervore prezentis al ili bonajn programerojn. Ekde la granda kultura revolucio la artistoj de la ensemblo pli firme sekvas la revolucian linion de Prezidanto Maŭ pri literaturo kaj arto. Stimulate de la heroa spirito de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en transformo de la naturo, ili partoprenis en la revolucia praktiko de la popolamasoj kaj dume kreis kaj prezentis multajn bonajn kantojn kaj dancojn kun klara nacia gusto varme prikantantajn laborantajn popolanojn de nacimalplimultoj. La lioj kaj mjaŭoj intime nomas ilin "nia ensemblo".






La danco *Mateniĝo ĉe Gumarba Plantejo* verkita de la ensemblo priskribas la feliĉan laboradon de gum-laboristinoj de la nova li-nacia generacio.



Maljuna kamparana onklino regalas la artistojn per kokoslakto post finiĝo de la prezentado.





*La Kampada Armeo Venas trans la Monto*, kiun kreis la ensemblo, spegulas la intiman rilaton inter ĈPLA kaj la li-naciaj popolanoj.

Artistinoj laboras kune kun gum-laboristinoj.






Ekzercado

Artistinoj lernas triki fiŝreton.







# Ruĝbrusta Orfazano

En Ĉinio troviĝas du specoj de orfazanoj (chrysolophus pictus), nome ruĝbrustaj kaj blankbrustaj. La blankbrustaj loĝas en sudorienta Tibeto, la okcidentaj partoj de Siĉuan kaj Gujĝoŭ kaj multaj rokozaj montoj de Junnan, je alteco de 2000 ĝis 4000 metroj super la mara nivelo. La ruĝbrusta orfazano troviĝas en la mont-regionoj de Kinghaj, Gansu, Ŝenhi, Gujĝoŭ, Hunan, Guanghi kaj aliaj provincoj.

La ruĝbrusta orfazano estas ne granda kaj lerta. La vira birdo havas tre belajn plumojn kaj malhele ruĝan bruston kaj ĝi ricevis la nomon pro sia ora kresto. La birdo iras ĉiam kun levita kapo kaj longa plumvosto kaj kuras tre rapide per siaj fortegaj kruroj, kaj per tio ĝi donas fieran imponecon. La ina birdo, kiu surhavas kafkolorajn plumojn kun makuletoj, estas malpli bela ol la vira.

Ĉiujare la birdoj generas idojn post aprilo. Kaj en vintro, kiam la montoj estas plene kovritaj de neĝo, ili amase flugas al malpli altaj montoj por trapasi tie la malvarman sezonon.





世界语《人民中国报道》一九七三年第九期（本刊代号：二——九一五）